

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 460
2013
jan.-dec.



**Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno
de la fondiĝo de EPA (2013.5.31 ~ 6.5)**

Enhavo

EPA 90

Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA...	3
Saluto de la Spirita Gvidantino de Oomoto.....	DEGUĈI Kurenai 4
Saluto de Ĉefdirektoro de la Centra Oficejo de Oomoto, Prezidanto de Universala Homama Asocio.....	TAGA Norijuki 6
Saluto de Ĉefdirektoro de Esperanto-Populariga Asocio....	MACUDA Haĵime 7
Renkontiĝoj kun Oomoto kaj ĝia allogo.....	Roman Dobrzyński 8
Gratulmesaĝo 1	Lee Jungkee 10
Gratulmesaĝo 2	Lício de Almeida Castro 11
Gratulmesaĝo 3.....	Ĉoe Simjung 15
Aliaj Mesaĝoj.....	18
Foto panorama.....	21
Karavane vizitis 19 Esperantistoj el Brazilo.....	MAEDA Ŝigeki 24
90 jaroj da efektiva uzo de Esperanto.....	Benedicto Silva 26

UK 98

Partopreno en la UK ĉe la glacia lando.....	OKUŬAKI Toŝiomi 28
Ĝojiga agado en maljusta mondo.....	Markus Gabor 30

JK 100

Niaj fakaj kunsidoj kadre de JEK100.....	HAZAMA Hirotoomi 31
Geamikoj parolis pri Oomoto kadre de Fakkunsido de Oomoto.....	33
Rakontis pri Mezorianta Paca Projekto.....	TABUĈI Jasuo 36

Aliaj

La Sankta Egidio organizas Internacian Packunvenon.....	AGOU Takaŝi 41
Tri plenaj semajnoj en Oomoto.....	Ĵenja Amis 45
Dankvortoj de s-ro Joel Amis.....	49
NAO DEGUĈI, biografio de la Fondintino de Oomoto (3)..	OOIŜI Sakae
	tradukita de Mathias DALMOSE 50
KONVINKIĜO de VIVĜOJO KIO ESTAS VERA "MI" ? (2).....	56
La LIBRO kun DVD "Rakontoj el Oomoto" estis publikigita!.....	62

Oomoto

Oficiala organo
de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai
(Universala Homama Asocio: UHA)
Internacia Fakoj de Oomoto,
Ten'on-kjo, Kameoka-ŝi,
Kioto-hu, 621-8686 Japanio

Telefono: + 81(771)22-5561
Telefakso: + 81(771)25-0061
E-mail: oficejo@epa.jp
Hejmpaĝo: [http://www.oomoto.or.jp/
Esperanto/index-es.html](http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html)

Fondita en 1925

Numero 460, 2013 januaro-decembro
Administranto: AGOU Takaŝi
Redaktoro: OKUŬAKI Toŝiomi

La kovrilo: Memorfoto de EPA 90

Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno de la Fondiĝo de EPA



Korusa grupo "Ĉielo" prezentis Esperantan himnon.

Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA okazis ĉefe en la Oomoto-Centro, Kameoka, ekde la 31-a de majo ĝis la 5-a de junio por celebri la jubileon. Ĝin aliĝis 35 eksterjapanaj esperantistoj el 6 landoj, inkluzive de la unusola invitito Roman Dobrzyński el Pollando kun 208 gejapanoj.

Nokte la 1-an de junio eksterjapanaj aliĝintoj ĝuis verdan teon, spektis Ŝimajon, demonstiron de batalarto Aikido kaj ludadon de japana tamburo kadre de "Vespero de Japanio". En tiu tago ili vizitis naskiĝlokon de Oomoto, Ajabe kaj spertis kaligrafion post la lekcionoj pri Oomoto.

En la 2-a de junio la monata ceremonio de Oomoto okazis kaj ĉiuj ĉeestis ĝin. Ĝi estis prezidita de du lingvoj, Esperanto kaj la japana. Ene de la ceremonio, la preĝvortoj por "la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA" estis Esperante oferitaj per voĉlego de la ĉefdiservanto.

Posttagmeze, la ceremonia programo sekvis kiel jene. Multaj gratulmesaĝoj estis prezentitaj post la voĉlego de la mesaĝo de la Majstrino DEGUĈI Kurenai, la Spirita Gvidantino de Oomoto. Kiel la eksterlanda gasto, s-ro Roman Dobrzyński, el Pollando, la eksa vicprezidanto de UEA kaj s-ro MIYOSHI Etsuo, la direktoro de EPA memore prelegis unu post la alia.

En la 3-a eksterjapanoj aŭskultis la lekcionojn pri Oomoto kaj Universala Homama Asocio kaj posttagmeze ili ekskursis al la fama turismejo, Araŝijama en Kioto. En la 4-a kaj 5-a eksterjapanaj aliĝintoj disiĝis al la urboj, Kioto, Oosaka, Takeda, Harima, Tokio kaj havis bonan ŝancon interamikiĝi kun surlokaj Oomotanoj en la Internaciaj Amikiĝkunvenoj.

Saluto de la Spirita Gvidantino de Oomoto

DEGUĈI Kurenai

Estimataj kaj karaj gesamideanoj,

Antaŭ ĉio mi esprimas elkorajn dankon kaj ĝojon al eksterlandaj samideanoj el ses landoj, nome, Pollando, Hungario, Koreio, Ĉinio, Argentino kaj Brazilo, kaj al enlandaj samideanoj el regionoj, proksimaj kaj malproksimaj, pro tio ke vi ĉiuj alkuris por festi la 90-jaran jubileon de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio.

Fakte, mi devas saluti kaj danki vin vidalvide, kaj tamen, en la sama tago, paralele okazas alia memora ceremonio de Oomoto en la gubernio Kumamoto, Kjuuŝuu; ĉar la tagordo por Kumamoto estis decidita pli frue, mi ja decidis ĉeesti en la ceremonio de Kumamoto. Mi do sincere pardonpetas vin.

Nu, en junio 1923, Majstro DEGUĈI Onisaburo enkondukis la internacian lingvon Esperanto en Oomoton kaj klopodis por disvastigi en transmaraj landoj, kune kun la instruo de Oomoto, la spiriton de Esperanto, kiun kreis d-ro Zamenhof per la koro de universala amo. De tiu tempo, la sinsekvaj Gvidantinoj kaj Kungvidantoj kaj aliaj multaj antaŭuloj heredis la volon de Sankta Majstro kaj, kun senĉesaj klopodo kaj fervoro, konkeris multajn provojn, kaj finfine ni atingis la tagon de la 90-jara jubileo. Ĉi

tion ni povas atribui al la varmaj subteno kaj kunlaboro de multaj simpatiaj samideanoj, kiuj agadas por la sama idealo kun ni.

Ĉe la alpreno de Esperanto al Oomoto Sankta Majstro diras jene.

"Ĉar ni devas konvinki per la bonaj kaj belaj vortoj, ĉesinte malami kaj ĵaluzi, antaŭ ĉio ni devas studi Esperanton, internacie komunan, por konvinki la mondon. Entute, farante homan amon Dia amo, mondscale larĝa kaj universala, ni devas havi la grandan spiriton."

Kaj ankaŭ la Tria Spirita Gvidantino Majstrino DEGUĈI Naohi diras jene.

"Koncerne Esperanton, la plej grava estas la ellerno de la lingvo Esperanto, kaj tio nepre necesas por ke ni estu loĝantoj en la estonta paca mondo. Esperanto estas tia lingvo, kia povas unuecigi la mondon super la baroj de politiko, religio kaj raso kaj ĉiam troviĝas kun la pozicio, komuna al ambaŭ flankoj dekstra kaj maldekstra. Do, escepte de Esperanto troviĝas neniuj, kiu agas tiom konkrete kaj senpartie sur la pacon." Kaj ŝi mem fervore lernadis Esperanton, trovinte eĉ iometan tempon.

Ĉi tiuj vortoj de Sankta Majstro kaj la Tria Spirita Gvidantino koncize montras la vojon, kiun ni iru. Kaj kiam ni rigardas la

situacion de la mondo, ni povas trovi multajn faktorojn, kiuj malhelpas la realigon de la paco; la mondo troviĝas en tiom streĉa stato. Ĝuste en tia situacio ni, kolektiĝantaj ĉirkaŭ Esperanto, bezonas reveni al la origina misio de Esperanto, bezonas konstrui la pacon en respektiva koro, kaj bezonas klopodi por ke la mondo estu plenplena de Esperanto.

Kaj mi deziras pli kaj pli strebi al la realigo de la ideala mondo, kiun celas nia organizo Esperanto-Populariga Asocio, al la konstruo de la mondo Miroku, en kiu popoloj povas vivi milde kaj ĝoje, kune kun vi kun ĝojo kaj kuraĝo, kun la koro de ambono.

Alveninte al la fino de la saluto el la fora regiono de Kumamoto, Kjuuŝuu, kie antaŭ 90 jaroj, tuj post la alpreno de Esperanto al Oomoto, Majstro DEGUĈI Onisaburo ellaboris la konatan verkon "Perpoema Vortaro Esperanto-Japana", mi preĝu elkore por la sukceso de la jubilea ceremonio, kune kun tio ke ĉiu samideano, ĉeestanta en la ceremonio, havu la fruktodonan feliĉan tempon.



Jen sen la disting'
de l' landoj kaj la homoj
disvastigu ni
la lingvon Esperanto
Ja sur la tuta terglob'.

(Utao de DEGUĈI Onisaburo)

Saluto de Ĉefdirektoro de la Centra Oficejo de Oomoto

TAGA Norijuki
Prezidanto de Universala Homama Asocio

En la nomo de Oomoto mi multe dankas al vi, ĉiuj estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, pro viaj ĉeestoj en hodiaŭa ceremonio el diversaj lokoj eksterlandaj kaj enlandaj.

Kaj ankaŭ mi elkore ĝojas pro tio ke, EPA povas okazigi la memorigan ceremonion hodiaŭ, bonvenigante la 90-jaran datrevenon de sia fondiĝo.

Doktoro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, tenis altan idealon tiel ke homoj interpaciĝu per la neŭtrala lingvo, kaj forigu la konfliktojn kaj la militojn pro la diferencoj de nacioj, rasoj, religioj kaj kulturoj.

Ni, oomotanoj sincere aprobas tiun lian idealon, kaj montras nian respekton al li.

Antaŭ 90 jaroj, nia majstro DEGUĈI Onisaburo, la kunfondinto de Oomoto, diris en sia verko "Rakontoj el la Spirita Mondo" kiel jene.

"Ni devas forigi ĉian videblan kaj nevideblan muron. La plej granda baro nevidebla estas malamikeco inter nacioj, rasoj, kaj ankaŭ inter religioj. ...La plej granda videbla muro estas nacia armado kontraŭekstera (ne tiu de enlanda policio) kaj malfermeco de lando per ŝtato. Antaŭ

ĉio ni devas forigi la nevideblajn murojn el nia koro, por forigi la videblan muron tutmondan."

Mi tutkore admiras vin, kaj ĉar vi, esperantistoj, efektive klopodas por nuligi la muron de la lingvoj inter homoj, popoloj, kaj nacioj, diverskampe en la mondo. Kaj mi pensas, ke ĝuste pro tiu motivo, kiun vi nun havas, nia majstro DEGUĈI Onisaburo enkondukis Esperanton en Oomoton en 1923, antaŭ 90 jaroj.

Mi deziras ke, en la proksima estonteco, la muroj videblaj kaj nevideblaj tute ne troviĝu en la mondo kiel la frukto de Esperantomovado.

Kaj mi esperas la prosperon de EPA en la venontaj jaroj, kaj ĝi certe kontribuos por atingi nian komunan idealon kaj venigi la veran pacan mondon sur la tero.

Mi finas mian saluton kun tutkora dankemo al vi ĉiuj. Bonvolu havi ĝojan tempon kun la programo, kaj ankaŭ gustumi belan atmosferon de Oomoto.

Koran dankon!

Saluto de Ĉefdirektoro de Esperanto-Populariga Asocio

MACUDA Haĵime

Bonan tagon karaj gesamideanoj!

Hodiaŭ, ni, ĉiuj membroj de EPA sentas nin tre ĝojaj, bonvenigante la 90-jaran datrevenon de la fondiĝo de EPA, kaj reale povante okazigi la memorigan eventon.

Cetere, mi multe bedaŭras pro tio, ke mi ne povas ĉeesti en ĝi, nun vizitante al Oguni, Aso, Gubernio Kumamoto por ĉeesti en la celebrado de Oomoto. Tamen, tiu ĉi loko, kie la majstro DEGUĈI Onisaburo, la Fondinto de EPA ekverkis internacie tre unikan vortaron kun la titolo "Perpoema Vortaro Esperanto-Japana por Facila Memorigo de Esperantaj Vortoj" ĝuste antaŭ 90 jaroj, koncernas al Esperanto.

Nun, mi estas tre dankemaj al vi ĉiuj, ke nia estimata samideano Roman Dobrzyński el Pollando kiel la invitita gasto de EPA, kaj 36 eksterjapanaj gesamideanoj el 6 landoj volontis veni al nia evento kun pli ol 160 membroj de EPA kaj enlandaj e-istoj, por ke ĉiuj surloke gratulu la 90-jaran datrevenon de la fondiĝo de EPA.

Parolante pri la paŝoj de EPA dum 90 jaroj, ni ne povas facile diri la vojon tre glata. Male, nia Esperanto-agado iujn fojojn maltrankviliĝis, ricevinte la rikadojn de la socio, pro kio ni devis pacience klopodi kaj klopodi kvazaŭ la modestaj pasoj de heliko.

Interalie, la majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto, kiu enkondukis Eseranton en Oomoton, iam diris, "Esperanto fariĝos la lingvo por regi la mondon." kaj instruis al ni la signifon tiel ke, "Esperanta movado havas vastaniman mision."

Krom tio, li laŭtvoĉe persvadis ke, "Diskonigi Esperanton al la mondo estas deca al la volo de Dio, studante tiun ĉi lingvon, kaj ĉar malfermi la vojon de Dio tute dependas de la vortoj. Tial, mi deziras, ke vi plene studu tiun ĉi lingvon, Esperanton. Mi aŭdis, ke troviĝas iuj, kiuj diris, "Estas bone nur plenumi modelojn en Oomoto, sed neniam estos kontentiga sekvi nur la modelojn; serioze studu Esperanton, mi petas."

Por tio, ke la vera valoro de Dia Lingvo, Esperanto, estu elmontrita en la mondo, ni, membroj de EPA, nepras pli multe peni por ĝia diskonigo kaj progresigo, komprenante ĝian grandan mision, ŝarĝitan sur niaj ŝultroj.

Mi elkore deziras antaŭenpuŝi la agadon de Esperanto kune kun vi ĉiuj multaj, kiuj donos al ni pli da afablaj gvidadoj por EPA.

Ĉe la fino de mia saluto, mi elkore esprimas al vi denove, multajn dankojn!

RENKONTIĜOJ KUN OOMOTO KAJ ĜIA ALLOGO

Roman Dobrzyński

Naŭdek jaroj de la ekzisto de Esperanto-Populariga Asocio konsistigas tri kvaronojn de la historio de Oomoto. Miaj kontaktoj kun Oomoto konsistigas unu trionon de mia tuta vivo. Ili daŭras ekde 1987, kiam Pola Televido komisiis al mi realigi dokumentan filmon pri Esperanto okaze de ĝia centjara jubileo kun la ĉefa tasko prezenti ekzemplojn de praktika aplikado de la lingvo internacia.

Mi serĉis ilin en 14 landoj de la mondo. En Japanio tiaj ekzemploj montriĝis troveblaj ĉe Oomoto. Nia filmteamo iris al Kameoka kaj Ajabe kaj realigis ne nur kvinminutan epizodon por la jubilea filmo, sed ankaŭ apartan tridekminutan dokumenton pri Oomoto. Ĝi estis la unua filmo pri Oomoto prezentita en Pollando.

Poste mi havis plezuron renkonti oomotanojn, ĉefe dum Universalaj Kongesoj de Esperanto. Ĝuste en UK de Roterdamo en la jaro 2008 alparolis min s-ro AGOU Takaŝi kaj proponis alvenon al Oomoto kun la perspektiva celo verki libron pri tiu ĉi movado. Verki libron ŝajnis tro granda defio, sed mi akceptis la inviton, por pristudi la temon surloke. Komence de la jaro 2009 mi pasigis ĉe Oomoto preskaŭ kvin monatojn.

Dum tiu tempo mi estis sola eksterlanda

esperantisto kaj fariĝis per la fakto mem la kialo de la uzado de Esperanto. Ĉiam pli kaj pli da personoj alparoladis min. Parto de ili praktikis la lingvon pli frue nur dum kursoj. La lingvo internacia eksonis pro mia ĉeesto, sed samtempe ĝi mirakle forŝovis de sur mia vojo lingvajn barojn. Esperanto evidentiĝis mia unusola komunikilo kaj tute reala rimedo solvanta la lingvan problemon. Tiel konfirmiĝis la vortoj de la Kvara Spirita Gvidantino, DEGUĈI Kijoko: Esperanto ne estas nur lingvo de la morgaŭo, sed ĝi estas la hodiaŭa lingvo.

En Kameoka ekzistas katolika preĝejo, kiun mi dimanĉe vizitis. La meso estis celebrata en la japana lingvo, sed mi povis aktive ĉeesti, konante ĝiajn liturgiajn tekstojn. Kiam la diservo finiĝis, ĉiuj samkredantoj scivoleme ĉirkaŭis min, dezirante kion ajn ekscii pri mi kiel ekzotika samkonfesano. En tiu momento, bedaŭrinde, leviĝis „muroj de miljaroj“. Ni, katolikoj, neniel sukcesis interkompreniĝi. Do, mi revenis al la Centro de Oomoto kiel al la familia hejmo, fakte al la reala peco de Esperantujo.

Mi estis invitata al lokaj branĉoj de Oomoto por partopreni Cukinamisai kaj aliajn festojn, dum kiuj oni invitis min paroli.



Miaj Esperantaj paroladoj estis interpretataj en la japanan. Mi neniam en mia vivo parolis en la lingvo internacia al tiom multnombra aŭskultantaro, sume kalkulebla je miloj da personoj. Mi baldaŭ trovis Oomoton, kiel integran elementon de la ĝenerala Esperanta kulturo. Jen la ĉefa premiso, kiu kuraĝigis min fronti la defion verki la libron. En majo 2009 mi forlasis Oomoton kun la sento ne posedi ankoraŭ sufiĉan scion por verki ĝin. Aliflanke ravis min la japana printempa sezono, ĝia bunteco, ekzotiko, fascinaj festoj kaj ankaŭ ĉiutagaj eventoj. Ĉio ĉi estis filminda. Hejme mi revuis miajn filmbildojn kaj konstatis, ke ili entenas materialon por interesa filmo. Mi faris ĝin kaj sendis kiel konkursaĵon al la Belarta Konkurso de UEA.

La filmo titolita Japana Printempo – Oomoto 2009, gajnis la unuan premion.

La verdikto estis anoncita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago en 2011. Ĉeestis reprezentantoj de Oomoto: s-roj TANAKA Masamiĉi kaj OKUŬAKI Toŝiomi. Dum la amika konversacio naskiĝis la ideo eldoni libron kune kun la filmo kiel ĝia apendico, por ke ambaŭ verkoj reciproke kompletigu unu la alian. Tiuspeca kombino de libro kaj filmo permesas pli profunde percepti ambaŭ verkojn. Verŝajne tia eksperimento okazas la unuan fojon en la Esperanta kulturo.

Realigado de ambaŭ verkoj daŭris kvar jarojn. Dum tiu tempo mi multege lernis pri la japana historio, kulturo, kutimoj kaj pri la japana toleremo rilate al religioj. Mi lernis pri Oomoto kiel socia kaj kultura movado, sed memkompreneble mi provis kompreni ĝin kiel religion. Nu, mi ne akiris sciojn de teologo. Tamen fascinis min kelkaj aspektoj de la Oomoto-doktrino, aparte tiu, kiu aprezas la rolon de homo, esprimitan per la vortoj, ke Dio sen homo ne estas ĉiopova. Danke al la koncepto Bankjou Doukon mi rimarkis paralelon inter la simpla virino Maria, kiu naskis Jesuon, la fondinton de kristanismo, kaj la simpla virino Nao, kiu pere de Dia posedo fondis Oomoton.

2013.6.2.

Gratulmesaĝo 1

Lee Jungkee

Prezidanto de Seula Esperanto-Kulturcentro

Estimataj gefestanoj,

Ĉu vi permesus min unue prezenti unu koreon, kiu estas inter ni? Li estas prezidanto de Esperantista Asocio de Ŭonbulismo. Li estas kuracisto kaj samtempe estas pastro de Ŭonbulismo. Lia nomo estas d-ro Kim Kwang-Soo. Jen, mi prezentas lin al vi. Li profunde kontribuis por nia movado ene de Ŭonbulismo.

Ankaŭ mi kore gratulas du gravajn festojn. Persone antaŭ 30 jaroj en la jaro 1983 mi estis en tiu ĉi tereno. Kompreneble tiam mi estis sufiĉe juna. Jam miaj haroj blankiĝis. Jen estas la kongresa libro, nome la 70-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj. Ene de tiu ĉi kongreso okazis festo, "Memore al la 60-jara fondiĝo de EPA". Ankoraŭ, mi konservas tiun ĉi karan kongresan libron en mia bretaro kaj mi portas hodiaŭ. Kaj ankaŭ mi memoras tre interesan

pupteatraĵon, Issun-bouŝi. Tio estis ŝoka por mi, ĉar la membroj de la teatra grupo prezentis teatraĵon en Esperanto. Kaj mi tiam surpriziĝis pro tio, ke milo da esperantistoj kolektiĝis en Kameoka. Kaj mi vidis tiom da esperantistoj en Japanio kaj mi pensis, ke en ĉiujaro tiom da esperantistoj kolektiĝus. Poste mi rimarkis, ke tiu kongreso estis jubilea kongreso je 70-foja. Tamen mi alte taksis kaj enviis vian kongreson.

Persone mi pensas, ke EPA estas ponto inter japanoj kaj koreoj. Nia estimata s-ro Ludoviko Zaleski Zamenhof diris, ke EPA estas ponto inter Oriento kaj Eŭropo. Mi volas diri, ke EPA estas reala aŭtentika ponto inter koreoj kaj japanoj. Ĝis nun pli ol 300 koreaj esperantistoj vizitis la urbon Kameoka kaj konatiĝis kun japanaj esperantistoj. Tra tiuj renkontiĝoj koreaj esperantistoj ekhavis tre bonan impreson pri Esperanto-movado de EPA. Mi memoras, ke niaj renkontiĝoj naskis aktuale grandan sukceson por ambaŭ flankoj. Pro tio mi ĉiam dankas al vi, Oomotanoj kaj EPA-anoj. Vi senpaŭze daŭrigis vian klopodadon por nia amika rilato. Kaj EPA kaj Seula Esperanto-Kulturcentro okazigas kurso-kunvenon ĉiujare alterne dum 24 jaroj. Ankaŭ tio estas tre notinda evento kaj frukto inter dulandaj esperantistoj. Mi kore dankas al vi kaj aparte esprimas mian dankon pro via varma akcepto por koreaj esperantistoj.

Koran dankon!

Gratulmesaĝo 2

Lício de Almeida Castro
Eksprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo

Mi parolas al vi, kiel eksprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj brakumas ĉiujn nome de miaj samideanoj. Kaj mi diras, ke estas granda honoro al mi paroli antaŭ vi.

Kaj mi rememoras, ke en 1989 mi konis Esperanton en mia lando, en la ĉefurbo Brasília, kie mi loĝas. Kaj mi jam scias pri la ekzisto en la mondo de Oomoto Internacia; kaj hodiaŭ mi partoprenas en la interamikiĝa evento, ĝuste la 90-jara datreveno de tiu ĉi Asocio. Do, mi gratulas al vi ĉiuj kaj inkluzive al la Membroj de EPA – Esperanto-Populariga Asocio. Mi rimarkis, ke ekzistas ĉi tie Dio.

Kaj mi konfesas la malfacilecon popularigi Esperanton kaj mi petas al vi helpon por ke vi donu al mi la ŝlosilon por ke mi faru tion en mia lando. Ho! Estas malfacile konvinki la homojn pri Esperanto, tio estas, komprenigi ilin ke la mondo estos bona unu mondo, se ni

ĉiuj volus.

Vidu ! Nia prezidanto de UEA, S-ro Probal Dasgupta, en lia mesaĝo diris, ke la ĉeesto de Oomoto – esprimiĝo de la japana kulturo – ĉiam rolis nutre al la monda Esperanto-Movado, kaj la oomotanoj komune havas la idealojn de “unu mondo” kaj “unu interlingvo”. Tio estas vera. Kaj en la sino de organiza strukturo de Oomoto, EPA efike kaj senfanfarone servadas kiel ambasadoro pontanta inter la esperantistaj kaj la oomotanaj interesoj. Tre gravaj voĉoj de nia amiko Probal Dasgupta.

Do, nome de vera esperantistaro, kaj kiel eksprezidanto tutkore mi gratulas Esperanto-Popularigan Asocion pro senlaca multjara servado al la Esperanta komunumo. Kaj la propra spirita honorado mi deziras al tiu organizaĵo kaj al ĉiuj Membroj longan kaj fruktoplennan vivon.

Mi elkore salutas vin,
Dankon!

Gratulmesaĝo 3



S-ino Jung Bong-won anstataŭe voĉlegis la gratulmesaĝon de la estro de Internacia Fakoj de Ŭonbulismo.

Ĉoe Simjung

Estro de Internacia Fakoj de Ŭonbulismo

Gratulon al la interamikiĝa evento memore al la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA.

Unue mi respektas antaŭvidon de Oomoto, kiu esploras unu veron, unu mondon kaj unu lingvon.

Mi ankaŭ gratulas Internacian Eventon de la 90-jara datreveno de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio (EPA) kaj okaze de la evento, Oomoto faru la bazon de tutmonda homara feliĉo, mi tutkore preĝas.

Kiel ni bone scias, Esperanto estas lingvo celanta homaranismon. Pro tio, mi respektas penetrajn okulojn de DEGUĈI Onisaburo, kiu frue rekonis la lingvon, enkondukis ĝin en Oomoton kaj praktikis la homaranismon.

Oni povus nomi la saĝon de DEGUĈI Onisaburo kiel homan jubileon, ĉar li jam antaŭvidis malferman epokon. Mi bone scias, ke Oomoto pozitive utiligis Esperanton por propagandi sian religion tra la mondo. Oomoto ankaŭ havas sinceran amon al Ŭonbulismo kaj ĉiujare sendas reprezentantojn por gratuli eventojn de Ŭonbulismo. Pro tio mi sincere dankas vin.

Ŭonbulismo estas en Koreio nove naskita budhismo, kiu celas ke unue trovu gracon kaj danku al ĝi, ĉar ĉiuj rilatas al graco unu la alian. Multe da metodoj troviĝas por danko.

Tamen Ŭonbulismo ĉefe instruas mensostudon kaj havas jenajn sloganojn: unu vero, unu mondo, homaro estas unu familio, kaj la mondo estas unu laborejo.

Mi pensas ke ĉiu religio celas fari homojn feliĉaj kaj la mondon bela. Do, mi bondeziras, ke Oomoto neniam forgesu tiujn celojn sed praktiku ilin. Ankaŭ mi preĝas, ke Oomoto progresiĝu tagon post tago kaj ĉiuj oomotanoj vivu laŭ la diroj de sanktuloj.

Ankoraŭfoje mi deziras progresiĝon de Oomoto kaj samtempe gratulas 90-jaran datrevenon de fondiĝo de EPA.

Aliaj Mesaĝoj

Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof

Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo. Jen mesaĝo ĉizita sur la ŝtono, kiu rememorigas la jaron 1923, kiam Oomoto adoptis Esperanton. Mi havis okazon admiri la monumenton en Kameoka, kiam mi venis por ĉeesti la feston okaze de la centjara jubileo de Oomoto. Mi tiam ankaŭ iris al Ajabe por inaŭguro de la belega Preĝejo de Eterna Vivo, kaj rememoris, ke nur kvin jarojn pli frue Esperanto fariĝis centjarulo. Ĝuste en tiu 1987-a jaro mi partoprenis la jubilean Universalan Kongreson de Esperanto en ĝia lulilo, Varsovio. Tiam mi la unuan fojon konatiĝis kun oomotanoj, dum la ekskurso al Bjalistoko, la naskiĝurbo de mia avo, Ludoviko Zamenhof.

Lia filino Lidia instruis al mi Esperanton kaj foje parolis pri la Bahaa kredo, kiun ŝi akceptis kiel sian religion. Mi eksciis, ke aliaj bahaaninoj inspiris la Kunfondinton de Oomoto, Onisaburon Deguĉi, akcepti Esperanton. Ekde tiam pasis 90 jaroj, dum kiuj Oomoto- kaj Esperanto-Movadoj daŭre interplektiĝas. Vivigis ilin ambaŭ aŭdaca celo komuna per sia universaleco. Laŭ Oomoto, ĉiuj popoloj kuniĝos en unu rondon. Laŭ Ludoviko Zamenhof, Esperanto celas krei "unu grandan rondon familian" de popoloj. Oomoto aspiras la forigon de fundamenta malamikeco inter rasoj kaj inter religioj. Ĝi subtenas interreligiajn ideojn proksimajn al la

Zamenhofa homaranismo.

Oomoto kaj Esperanto aperas kiel du gravaj pilieroj de la Ponto inter Oriento kaj Okcidento.

.....



Probal Dasgupta
Prezidanto de
Universala Esperanto-
Asocio

Saluton!

La naŭdek-jara jubileo de Esperanto-Populariga Asocio, solene festota de la 31a de majo ĝis la 5a de junio 2013, estas grava evento, kiun kun granda plezuro celebros multaj esperantistoj tiel en Kameoka kiel defore, en kaj ekster Japanujo. La ĉeesto de la Oomoto-esprimiĝo de la japana kulturo ĉiam rolis nutre al la monda Esperantomovado, kun kiu la oomotanoj komune havas la idealojn de "unu mondo" kaj "unu interlingvo". En la sino de la organiza strukturo de Oomoto, EPA efike kaj senfanfarone servadas kiel ambasadoro pontanta inter la esperantistaj kaj la oomotanaj interesoj.

Universala Esperanto-Asocio estas religie kaj kulture neŭtrala. Ĝi ne rajtas aparte elstarigi tiun aŭ alian formon de kredo aŭ malkredo. Sed la funkciuloj de UEA estas individuoj kun propraj fonoj kaj preferoj. Mi estas baratano apartenanta al la religio hinduismo; kvankam mi persone ne kredas

je Dio, tiu malkredo estas unu el la alstaroj legitimaj en la hindua repertuaro, kiu ne trudas unu specifan doktrinon al ĉiuj siaj anoj. La hinduismo havas multon komunan kun la instruoj de Oomoto. Jam de 1968 mi ŝate legas la gazeton Oomoto. Mi ofte verkis por ĝi, precipe en la tempo kiam redaktis ĝin la stelulo T. Nakamura, kies "Enciklopedieto Japana" estis klasika atingo sendube farinta pli da laboro por konigi unu kulturon al la esperantista mondo ol iu ajn alia tiu ampleksa referencilo. En 1974, kiam mia lando elprovis nuklean armilon, Oomoto aperigis mian publikan proteston kontraŭ tiu atenco kontraŭ la monda paco. En tiu epoko, longe antaŭ la apero de la reto, ne estis facile trovi taŭgajn aperigejojn por tiaj opiniesprimoj. Mi persone ĝojas, ke el la 90 jaroj de la vojaĝado de Oomoto al sia nuna jubileo, mi kunpaŝis preskaŭ duonon de la vojo.

Estas por mi granda privilegio, povi en la nomo de UEA tutkore gratuli Esperanto-Popularigan Asocion pro senlaca, multjara servado al la Esperanto-komunumo kaj al la propra spirita kunularo; ni deziras al tiu organizaĵo, ĝiaj fratinoj kaj iliaj membroj longan, fruktoplennan vivon. Kore salutas

.....

SUZUKI Keiichiro

Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto

Estimataj gesinjoroj de Esperanto-Populariga Asocio,

Okaze de la 90-jara datreveno de la fondiĝo

de Esperanto-Populariga Asocio (EPA), mi gratulas vin ĉiujn nome de Japana Esperanto-Instituto.

EPA ege kontribuis al la Japana Esperantomovado daŭre dum ĉi tia longa tempo por monda paco supervenkante multe da malfacilaĵoj. Ekde 1973 EPA organizis la Japanajn Esperanto-Kongresojn kvarfoje, 60-an, 70-an, 80-an kaj 90-an en Kameoka kaj sukcesigis ĉiujn kun riĉaj programeroj kaj multe da aliĝintoj. JEI elkore estimas kaj aprezas vian aktivan agadon por disvolvado, lernado kaj utiligado de nia lingvo.

Cetere ĉi-jare en oktobro Japana Esperanto-Kongreso jubileos sian 100-an fojon en Tokio. La kongresa temo estas "Esperanto ligas homajn korojn — de la pli ol 100-jara historio al estonteco." Ni fervore atendos vian kunlaboron kaj partoprenon.

Ĉi-foje EPA okazigas solenan Interamikiĝan Eventon memore al la 90-jara datreveno dum 5 tagoj. Ni deziras vian grandan sukceson pri ĉi tiu evento.

JEI esperas, ke EPA prosperos daŭrigante pozitivan aktivecon pri Esperanto.

.....

Takuma Kenzi

Prezidanto de Kansaja Ligo de Espeanto-

Grupoj

En la nomo de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj mi gratulas vin pro tio, ke Esperanto-Populariga Asocio (EPA) festas la 90-jaran datrevenon de sia fondiĝo, kaj okazigas

la grandiozan memorigan ceremonion kaj interamikiĝan eventon, en kiuj partoprenas multe da membroj de EPA kaj gastoj eksterlandaj kaj enlandaj. Antaŭ 90 jaroj en 1923 Majstro Deguĉi Onisaburo lernis Eperanton kaj enkondukis ĝin al la aktivecoj de Oomoto.

EPA agas aktive por disvastigi Esperanton. EPA aŭ Oomoto prezentadas partojn de la japana tradicia kulturo en la programero okaze de Universalaj Kongresoj. Tial Oomoto estas fame konata inter alilandaj esperantistoj. Kaj EPA okazigis Japanajn Esperanto-Kongresojn 4-foje. Tiuj estis la 60a, 70a, 80a, kaj 90a memorigaj kongresoj en ĉiu 10a jaro. EPA okazigas ankaŭ intensivajn kursojn, nome, Transjara Kurskunveno de Eperanto kaj Internacia Kurskunvno de Esperanto, en kiuj partoprenas multe da alilandanoj. Mi esprimas mian respekton al vi, EPA pro tia vigla aktiveco praktike uzanta Esperanton.

Mi esperas, ke la evento de la 90-jara datreveno estos sukcesa kaj fruktodona.

Sincere Via,

.....

Karlo Rowe
Naojo Rowe
(Anglujo)

Elkoran gratulon je la 90-jara datreveno de la fondiĝo de la Esperanto-Populariga Asocio de Oomoto!

Majstro Onisaburo enkondukis Esperanton

en la aktivecojn de Oomoto en 1923, sed laŭdire li jam konsciis pri la neceso de komuna lingvo por la tuta mondo, studinte la sanktajn skribojn de la Fondintino Deguĉi Nao. La unua efektiva renkontiĝo kun Esperanto okazis, kiam la Dua Spirita Gvidantino Sumiko hazarde renkontis du usonajn misiistojn de la Bahaa Kredo, kiuj tiam mondvojaĝis uzante Esperanton. Ili klarigis, ke la ideo de komuna lingvo akordas kun la instruoj de Bahaismo pri la unueco de la homaro. Onisaburo senprokraste organizis Esperantajn lecionojn por la Oomotanoj, kaj fondis la EPA-on por kontribui al la disvastigo de Esperanto en Japanujo. Baldaŭ poste, Onisaburo fondis ankaŭ la Universalan Homaman Asocion, kaj la Mondan Ligon de Religioj. Tiel estis starigitaj la tri kolonoj, kiuj subtenas la aktivecojn de Oomoto, koncize esprimitaj en la moto Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo.

Kiam ni rigardas la staton de la mondo hodiaŭ, post naŭdek jaroj, ni rimarkas, ke dialogo inter religioj fariĝas pli normala ol antaŭe, kvankam baroj ankoraŭ ekzistas. La politika unuiĝo de la mondo ŝajnas esti tre malfacila, sed la ideo de regiona identeco kaj respekto al lokaj tradicioj samtempe kun solidareco al la monda homaro jam enradikiĝis. Se temas pri "Unu Interlingvo", ni ankoraŭ renkontas miskomprenon kaj antipation; tamen, dank' al viziuloj kiel Onisaburo kaj al la klopodoj de la anoj de EPA kaj aliaj, la movado vivas kaj progresas, kaj kontribuas al la granda kaj neevitebla

ŝanĝo, kiu estas bezonata por la estontaj prospero kaj feliĉo de la homaro.

Dezirante al ĉiuj partoprenantoj en la Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno de EPA ĝojan kaj fruktoplenan restadon en Kameoka.

.....

Jo Haazen.
Honora direktoro de la Reĝa, Meĥelena
Kariljonlernejo (Belgio),
Honora Eŭropa Senatano,
Profesoro je la Sankt-Peterburga Ŝtata
Universitato (Rusio)

Tre estimataj kaj karaj Japanaj amikoj!

Mi kore gratulas vin okaze de la naŭdek-jara datreveno de la Esperanto-Populariga Asocio kaj bone memoras pri miaj vizitoj en Kameoka, la centro de la tre respektinda kaj laŭdinda Movado OOMOTO, kies himnon mi antaŭ multaj jaroj volonte kaj entuziasme komponis. Kvankam mi vivas kaj laboras en Okcidenta kaj Orienta Eŭropo – malproksime de via lando – mi ofte pensas pri vi kaj ege ŝatus reveni al Japanio por denove renkontiĝi kaj kontribui al la disvolviĝo de via bela kaj fruktodona asocio. Daŭrigu karaj amikoj! Ĝoju kaj prosperu! Via laboro estas tre utila kaj nobla!

.....

Wu Guojiang
Komitatano B de UEA
Komisiito de UEA pri la projekto Ĝemelaj

Urboj, Eksterlanda raportisto de "Nova Vojo"

Estimata Esperanto-Populariga Asocio,

Mi esprimas elkoran gratulon al vi.

Esperanto-Populariga Asocio (EPA) havas gloran historion kaj faris grandan kontribuon al la Esperanto-movado. Ĉi tie mi volas diri, ke EPA estas unu el la Esperanto-organizaĵoj, kiuj plej frue kaj sukcese aplikas Esperanton en la agado de ĝemelaj urboj. La nomon Itô Eizô vi ne forgesis, li estris EPA post 1967. Estas li kiu per Esperanto akcelis ĝemeliĝon inter Kameoka kaj la aŭstria urbo Knittelfeld en 1964, kune kun Adolf Halbedl, esperantisto el Aŭstrio. La interkonsento de ĝemelaj urboj estis subskribita en tri lingvoj la japana, la germana kaj, inter ili, Esperanto. Okaze de la 40-a datreveno de ĝemeliĝo en 2004 reaperis la historia sceno: du urbestroj subskribis oficialan deklaron de paco ankoraŭ en tri lingvoj: la japana, Esperanto kaj la germana. Ĝis nun tia ekzemplo estas rara en la Esperantujo.

Ĉi tie mi volas diri, ke EPA priatentas ne nur semadon de la tradicia kulturo Oomoto, sed interŝanĝon de internacia kulturo. En 2004 "Nova Vojo", la revuo de EPA, varbis eksterlandajn raportistojn kaj aperigis dekojn da artikoloj pri kulturoj de diversaj landoj. El tio oni plu vidas la rolon de Esperanto. Ĝis nun tia ekzemplo ankaŭ estas neofta.

Ĉi tie mi devas mencii, ke "Nova Vojo" havos la 500-an numeron en la venonta oktobro. Tio ankaŭ estos festinda. Ĉio ĉi montras ke la hodiaŭaj fruktoj rezultas el

la komuna penado de generacioj de EPA-laborantoj. Mi kore salutas ilin.

Mi bondeziras al EPA grandan sukceson, kredas ke ĝi plue verkos brilan paĝon por nia movado.

.....

WANG Minhao

Prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio

Estimataj kaj karaj Oomotanoj-amikoj,

Okaze de la 90-a Jubileo de la Fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio permesu min esprimi mian plej varman gratulon al vi nome de Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj mi mem!

Dank' al estimata majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto, kaj DEGUĈI Nao, la Fondintino de Oomoto, la 28-an de julio, 1923 estis fondita Esperanto-Societo en Ajabe. De tiam Oomoto instigas siajn kredantojn ne nur lerni Esperanton sed ankaŭ daŭre kultivi sin je diversaj aspektoj de la tradicia japana arto. Dum 90 jaroj EPA organizis apartajn aranĝojn por eksterlandaj esperantistoj, kiuj volas sperti la tradician japanan kulturon. En aranĝoj oni eblas sperti la tradician kulturon japanan en la internacia etoso de Esperantujo, kaj samtempe la internaciismon de Esperanto en la etoso de tradicia Japanio.

Mi eksciis pri Oomoto kaj EPA jam de antaŭ 30 jaroj, septembre 1984. Tiam mi honore akceptis kaj akompanis s-ron Saito Hiroŝi el Oomoto kaj aliajn 4 junajn japanajn

e-istojn, kiuj vizitis nian urbon Ŝanghai.

Post 5 jaroj, en la jaro 1989 mi unuafoje vizitis Oomoto-Centrojn en Kameoka kaj Ajabe kaj daŭre mi havas plurajn ŝancojn por kontakti Oomotajn esperantistojn, kiuj fariĝis miaj intimaj amikoj. Pro tio mi plimulte konas pri Oomoto kaj EPA.

Mi ege ĝojas kaj fieras pro la grandaj sukcesoj, kiujn akiris EPA dum pasintaj 90 jaroj kaj elkore deziras pli kompaktan kunlaboron inter ni por mondpaco kaj amikeco!

Transdonu mian tutkoran saluton al miaj oomotajn amikoj!

Plenan sukceson al via memorinda evento!

.....

Chimedtseren Enkhee,

Delegito de UEA en Mongolio kaj vicprezidanto-sekretario de KAEM

Estimataj kaj karaj samideanoj,

Estas granda honoro kaj plezuro por mi sincere kaj amikece saluti vin okaze de la 90-jara datreveno de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio.

En la jaro 1923 laŭ iniciato de granda sanktulo Deguĉi Onisaburo ekfandiĝis EPA. Dekomence sub la saĝa gvidado de la periodaj Gvidantoj de Oomoto esperantistaj oomotanoj diligente kaj grandanime agadas por popularigi nian karan lingvon Esperanto kaj ĝian homaranisman ideon al japana publiko sub la devizo; Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo. La instruoj de Esperanto

kaj Oomoto mirinde akordiĝas por homa harmonia vivado kaj justa mondo.

Mongolio kaj Japanio havas mirindan historion kaj apartan kunligon koncerne al Oomoto kaj Esperanto. Jam ĉirkaŭ 90 jarojn antaŭe la granda majstro Deguĉi Onisaburo celis Mongolion por surloke konstrui spirite idealan mondon favoratan de Dio.

Bonokaze al mia gratulo, mi deziras menci, ke iu japana legendo ankaŭ rakontas la misteran historian kunligon de japanoj kaj mongoloj. La legendo diras, ke en pratempo iu japana heroo Minamoto no Joŝicune venis en Mongolion por juste ordigi la mondon.

Kiel vi scias, ke Mongola Esperanto-Societo kaj EPA jam havas riĉan kaj reciproke respektan kunlaboradon. Unu el la perfekta ekzemplo de tiu kunlaborado estis la 6-a Azia Kongreso en 2010. Anime, homforte kaj eĉ finance multe helpis la kongreson EPA kaj Oomoto. Ĉiam ni dankas vin pro viaj sindonemaj helpoj.

Kiel viaj fidelaj kaj samideanaj amikoj, ni kun granda fiero kaj ĝojo rigardas viajn brilajn, diligentajn kaj sukcesajn agadojn. Por nia komuna celo popularigi Esperanton kaj ĝian internan ideon, Homaranismo kaj Homaman instruon de Oomoto ni kune kunlaboru ĉiam rikoltplene!

Mi bondeziras al vi pli da prospero kaj sukcesoj!

Estante kun vi spirite, kore salutas,

.....

Bharat K Ghimire

Mi unue gratulas al ĉiuj Oomoto-familianoj 90-jaran kompletigon de EPA servantan al la popolo de la mondo. Paco, kunlaboro, amikeco kaj egalrajto estas fundamento de Oomoto, kiun nunan mondon vere bezonas por ĝia paciĝo. Oomoto estas ne nur religio sed ĝi estas filozofio kiu helpas nin pli feliĉe vivi kaj vivigi alian. La koncepto, Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo, kuraĝigas ĉiujn esperantistojn de la mondo. Nome de nia Asocio kaj mi persone kiel nematura Oomotano esprimas sinceran gratulon al ĉiuj kaj en venontaj tagoj ni pli disvastigu la principon de Oomoto al la mondo por ke ĝi atingu vere bezonatan popolon.

.....

USUI Hiroyuki
Pekino, Ĉinio

Karaj gesamideanoj,

Mi volas gratuli vin okaze de la 90-jara jubileo de la Esperanto-Populariga Asocio. Kvankam mi ne konfesas vian kredon, kiel esperantisto mi sciis pri via ordeno de frua juneco. Mi memoras, ke mi partoprenis en la 70a, laŭ tiama nomo, Kongreso de Japanaj Esperantistoj, kiu havis lokon en Kameoka en la jaro 1983.

Dum la lastaj dek jaroj mi esploris pri sociaj ideoj en moderna Japanio kun aparta emfazo pri la propono de KITA Ikki enkonduki

Esperanton en la landon. DEGUĈI Onisaburo iam renkontis lin. Laŭ mia kompreno tiuj du pensuloj pledis, kvankam tra malsamaj kanaloj, por ia radikala socia reformo en Japanio. Pro tio mi havis okazon studi kelkajn librojn pri la historio de Oomoto, kaj rekonis la grandecon de via Kunfondinto.

Vivante nun sur fremda tero mi sentas min kuraĝigata ĉiufoje, kiam mi aŭdas pri viaj agadoj en Mongolio, kiu ja najbaras al Ĉinio. Mi esperas, ke vi daŭrigos vian laboron en diversaj aziaj landoj. Mi pretas kunlabori kun vi, kiam tio montriĝos necesa.

Amike salutas,

.....

Mathias Dalmose
Danio

Kara Esperanto-Populariga Asocio,

Salutas vin el Svedio dano, relative nova amiko, kiu renkontis vin unue antaŭ nemultaj jaroj, okaze de mia bonŝanco, unue kiel vizitanto kaj poste kiel ia tipo de kunlaboranto ĉe via oficejo en Kameoka. Mi pasigis tie tre spertoriĉajn tri monatojn, amikeme gastigita sub la tegmento de Oomoto.

Esperanto estas mirinda afero, lingvo kapabla pensi kaj eĉ agi homojn laŭ komprena kaj amikema maniero, do mi dankas kaj gratulas vin pri via multjara laboro disvastigi la lingvon kaj konon pri ĝi!

Ĉion bonan al vi kaj viaj kunlaborantoj!

.....

Oomoto 460

Joel Amis

Montrealo, Kebekio, Kanado

Por mi, "Japanio", "Oomoto" kaj "Esperanto" estas vortoj tiom interligitaj, ke mi malfacile imagas Esperantan vivon en Japanio (aŭ eĉ internaciskale, se konsideri la ĉiaman partoprenon de la Oomoto-karavano en UK!) sen la kontribuo de Oomoto. Loĝinte du jarojn en la Kansaja Regiono, mi ofte havis kontakton kun Oomoto – kontaktoj kiuj ĉiam estis inspiraj, instruaj kaj pensigaj. Tiu inspirado daŭras ĝis hodiaŭ – ĝis tiu punkto ke Oomoto fariĝis la ĉeftemo de mia magistra tezo en religiaj studoj!

Do, okaze de ĉi tiu 90-jariĝo de EPA, mi deziras ne nur gratuli Oomoton pro ĉi tiu grava datreveno, sed ankaŭ danki Oomoton pro ĝia valora kontribuo al la Esperanto-Movado kaj al la paco kaj unueco inter popoloj. Kaj mi dankas al Majstro Onisaburo Deguĉi por ĉi tiu instruo kiun la mondo tiom bezonas aŭdi: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo!

.....

Ĵenja Amis

Montrealo, Kebekio, Kanado

Mia unua rekta kontakto kun Oomoto (krom vizito al la fakkunsido de Oomoto en la UK de Bjalistoko) okazis en mia unua vizito al Japanio pasintjare. Pro plenplena itinero, ni povis pasigi nur tri tagojn en

Oomoto – sed tiuj tagoj estis plenplenaj je interesaj kaj instruaj spertoj. Fakte, mia vizito al Oomoto estis kiel mia “inico” en la tradician japanan kulturon (ja, preskaŭ tuj post nia alveno ni ektrovis nin partoprenantoj en aŭtentika japana te-ceremonio)! Mi dankegas al ĉiuj kiuj bonkore akceptis, gvidis kaj prizorgis nin en Oomoto, kaj mi dankas al Oomoto pro la eblo malkovri la tradician japanan kulturon pere de Esperanto!

Gratulon, EPA, je via 90-jariĝo, kaj dankon pro via gravega kontribuo al la Esperanto-Movado kaj al la progreso de paco, amikeco kaj unueco inter popoloj.

.....

Joel Brozovsky
Usono

Miajn elkorajn bondezirojn mi sendas al vi kaj al ĉiuj amikoj ĉe Oomoto. Mi preĝas la bonan sukceson de la evento, kaj prosperon de EPA kaj Oomoto.

.....

Nguyen Thi Phuong (Flama)
Vjetnamio

Saluton el Vjetnamio.

Mi estas Phuong kiu havis bonŝancon viziti Oomoton. Ĝi estas unu el la plej belaj memoroj de mia vivo.

Kvankam mi havis mallongan restadon tie ĉi, sed Oomoto kaj Oomotanoj donis al mi belajn impresojn. Mi ĉiam revas reviziti vin.

Okaze de la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA, bonvolu akcepti miajn plej bondezirojn. Mi deziras bonajn sanojn al ĉiuj esperantistoj de EPA, kaj ke vi daŭrigu entuziasman laboron por Esperanto kaj atingu novajn sukcesojn konigi Esperanton kaj Oomoto-ismen al la mondo.






Spektado de Noa danco en Kameoka



En natura agrikulturejo en Ajabe



Memora foto en Ajabe



Sperto de kaligrafio en Ajabe

EPA 90



Spektado de batalarto Aikido en Kameoka



Sperto de kaligrafio en Ajabe



Spektado de teksejo en Ajabe



Spektado de ludado de japana tamburo en Kameoka



S-ro Miyoshi Etsuo
memorprelegis



Diceremonio memore al 90-jara
datreveno de fondiĝo de EPA



S-ro Lee Jungkee(dekstre) el
Koreio estis honorigita



Junulara agado en Koreio
estis prezentita de f-ino Onia



Spektado de filmo farita de
s-ro Roman Dobrzyński



Ĉiuj ĝuis bonan etoson



Ĉiuj partoprenantoj ĝuis
Aïa-dancon



Ludado de rokbando en Esperanto

anorama



Ekskurso al Araŝijama



Spektado de skeĉo



Postkongresa ekskurso en
Oosaka



Ekspozicio pri agado de EPA

Karavane vizitis 19 Esperantistoj el Brazilo

~ Emociaj spertoj en la sanktaj terenoj de Ajabe kaj Kameoka ~

MAEDA Ŝigeki

De la 29^a de majo ĝis la 11^a de junio 19 brazilanoj (14 el Braziljo, 5 el San-Paulo) restis en Oomoto (Kameoka) kaj partoprenis en la koncernaj eventoj pri la 90-jara jubileo de la fondiĝo de EPA, kaj ili vizitis la vidindajn lokojn en Japanio. Inter la karavananoj troviĝis la geedzoj de d-ro Licio de Almeda Castro, antaŭa prezidanto de BEL (Brazila Esperanto-Ligo), prof. Benedicto Silva, prezidanto de AOI (Amikaro de Oomoto Internacia) kaj aktivaj esperantistoj en Braziljo.

La vizito de karavano el Braziljo ne estas unuafoja, antaŭ 6 jaroj (2007) jam ĝi okazis: por partopreni en la Internacia Somera Evento "Bonvenon al Oomoto 2007!". En la kadro de ĉi tiu evento okazis la Esperanta Utafesto de Oomoto, unuafoje en la historio de la utafesto, kaj en ĉi tiu okazo partoprenis 18 brazilanoj.

En la 29^a de majo, vespere, la karavano atingis la flughavenon Itami kaj, prenante la vespermanĝon survoje de la flughaveno, la karavano alvenis al la sankta tereno de Oomoto (Kameoka) en malfrua nokto.

En la 30^a de majo, ĉiuj karavanaj membroj estis prezentataj antaŭ la laboristoj de la centra oficejo de Oomoto en la matena kunveno, kaj poste, de la 11^a horo,

antaŭtagmeze, la karavananoj vizitis la urbodomon de Kameoka, kaj ili ĝuis la harmonian interparolon kun la urboestro sinjoro Masataka KURIYAMA.

De la 31^a de majo ĝis la 3^a de junio, en la daŭro de diversaj eventoj, inkluzive de la ceremonio de la 90-jara datreveno de la fondiĝo de EPA, la karavananoj ne nur spertis la Esperantajn eventojn, sed ili multe emociiĝis pro la sankteco, pureco kaj trankvileco de la sanktaj terenoj de Ajabe kaj Kameoka.

En la 4^a kaj la 5^a de junio, la karavananoj vizitis la branĉan templon de Oomoto Takeda-becuin, kaj ili multe ĝuis, kaj tranoktante en la historia domo, konstruita antaŭ 500 jaroj kaj suprenirante la monton Torahuse, sur kiu troviĝas la ruino de la kastelo Takeda.

En la 6^a de junio, la karavananoj vizitis Tokian Centron kaj la centra oficejo bonvolis prepari por ili la rajton de oficiala preĝado. Post la preĝo, la centra oficejo regalis la karavananojn per ĉanojo. Vespere Tokiaj esperantistoj organizis la bonvenigan kunvenon por brazilaj gastoj en japanstila restoracio.

En la sekva tago (la 7^a), la vojaĝgrupo vizitis la Brazilan Ambasadon kune kun



Karavano el Brazilo en Hiroŝimo

la vicestro de Tokia Centro de Oomoto sinjoro Joŝihide MORI, kaj ĉiuj membroj intervidiĝis kun la vicambasadoro sinjoro Alexandre Vidal Porto. En la interparolo la vicambasadoro tuŝis la meritan Esperantan agadon de Oomoto.

En la 8^a, la membroj de la karavano vizitis la urbon Hiroŝimo sub la gvido de sinjorino Mineko MORIŜITA, sinjoro Akio KAGAMI kaj sinjoro Jasuo TABUĈI (ĉiuj estas esperantistoj en Oomoto). En la Paca Parko la karavananoj ĉiuj dediĉis la rekvieron en rondo antaŭ la eterna fajro. En la muzeo de atombombo kelkaj karavaninoj ploris pro la tragikaj ekspoziciaĵoj. Post la Paca Parko ili vizitis la sanktejon Icukuŝima, Mijaĵima. Ili multe ĝojis pro la belaj pejzaĝoj kaj la petolaĵoj de ĉarmaj cervoj

En la 9^a, ili vizitis Kioton por la aĉetado de donacaĵoj al siaj familianoj kaj amikoj. Kaj en la sekva tago (la 10^a), vespere, la centra oficejo organizis la adiaŭan kunvenon por

la karavananoj el Braziljo. En la kunveno, sinjoro Ŝigeki MAEDA, direktoro de Oomoto Internacia, raportis ke 12 brazilanoj en la karavano Oomotaniĝis kaj iliaj dokumentoj de Oomotaniĝo estis transdonitaj de la direktoro de Oomoto Internacia al sinjoro Tacuo MACUDA, estrarano de Oomoto.

Tio, ke 12 membroj en la karavano Oomotaniĝis, estas tute ne atendita rezulto. Sed, ilia decido estas facile supozebla, se ni rememoras la okazon, kiam ili intervidiĝis kun Majstrino: Majstrino salutis ilin manpreman unu post alia. Ĉiuj karavananoj multe emociiĝis. Ilin kortuŝis ankaŭ la tutkora kaj atentema prizorgado de ĉiuj laboristoj en la centra oficejo de Oomoto. En la 11^a, malgraŭ la frua mateno, multaj laboristoj en Oomoto-Centro kolektiĝis en la flughaveno Itami por adiaŭi siajn novajn vojkamaradojn.

90 JAROJ DA EFEKTIVA UZO DE ESPERANTO

Benedicto SILVA (Brazilo)

Prezidanto de Amikaro de Oomoto Internacia

En la tuta mondo, multaj homoj ankoraŭ tute ne kredas pri la efikeco de Esperanto. Multegaj vidas en nia internacilingvo nuran utopion, nuran fantazion de revemaj idealistoj... Kaj ili klopodas pravigi siajn asertojn per argumentoj ne nur kontraŭ Esperanto, sed ankaŭ kontraŭ ĉia planita lingvo. Eĉ se tiuj argumentoj montriĝas malĝustaj aŭ science senbazaj, naivuloj tute simple ilin akceptas kiel veraĵojn, kaj kreas en sia menso kaj eĉ en sia koro se ne malamon, almenaŭ indiferentecon kontraŭ la ideo pri artefarita lingvo ĝenerale, aŭ pri Esperanto aparte.

Tamen, kion mi kaj multnombraj homoj vidis kaj sentis en la terenoj de OOMOTO en Kameoka kaj Ajabe, en majo-junio de tiu ĉi jaro, estas forta pruvo, ke Esperanto estas efika komunikilo, ebliganta plurnaciajn kaj plurkulturajn homojn kompreni sin reciproke, en kvazaŭ nacia etoso aŭ efektive frateca interrilato.

Plej trafe asertis tion la ĵurnalisto kaj reĝisoro de la Pola Televido, s-ro Roman Dobrzyński, en siaj "Rakontoj el Oomoto": En mia propra vivo de esperantisto mi renkontis en la tuta mondo nur tri lokojn, kie oni povas ĉiutage profiti sian konon de Esperanto. Tio estas la centra oficejo de Universala



Esperanto-Asocio, la brazila esperantista edukejo Bona Espero kaj Oomoto.

Mi senrezerve konfirmas tiun aserton de la pola esperantisto!

Kaj tian saman impreson ankaŭ mi havas, ekde mia unua vizito en la centro de Oomoto en 1983, en Ajabe kaj Kameoka. Minimume, almenaŭ la salutvortojn oni ofte aŭdas en la vastaj koridoroj aŭ eksteraj teritorioj de du japanaj urboj, fare de ridetantaj geknaboj kaj

gejunuloj...

Tiun saman etoson mi forte kaj agrable spertis en la du semajnoj, kiujn mi, mia filino Dulce Mara, kaj aliaj dudek gebrasilanoj pasigis en la Oomoto-centroj dum la festoj de la 90-jara datreveno de la enkonduko de Esperanto en Oomoton kaj de la fondiĝo de Esperanta-Populariga Asocio.

Mi firme kredas, ke en baldaŭa estonteco tiu scenejo etendiĝos al la tuta terglobo. Flanke de la angla, ne neigeble riĉa lingvo, Esperanto fariĝos la tutmonda komunikilo por ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj, ĝuantaj en nia erao la netakseblajn rimedojn de la moderna teknologio, kies plej alta esprimo estas, sendube, la interreto!

Esperanto kaj interreto estas la idealaj komunikiloj de la junularo, ne en proksima estonteco, sed jam nun.

Oomoto jam realigas tiun mirindan mondon!

Ĉi tiujn pensojn inspiris al mi la neforgeseblaj tagoj, kiujn mi pasigis en la Oomoto-Centroj okaze de la festoj de EPA90.



Partopreno en la UK ĉe la glacia lando

OKUŬAKI Toŝiomi

La 98-a Universala Kongreso okazis en Rejkjaviko de Islando kun la ĉeesto de 1034 partoprenantoj el 55 landoj.

Meznokte, mi alvenis al glacia lando. En la 20-a de julio mi iris al kongresejo kaj renkontis s-ron Roman Dobrzyński (honora membro de UEA), la verkinto de libro "Rakontoj el Oomoto" kun DVD. La 20 ekzemplerojn, ĵus printitan kunportis li. Mi kune enmetis DVD-n al travidebla sako kaj algluis ĝin al la malantaŭa kovrilo de la libro. Poste ni negocis kun s-ro Ionel ĉe libroservo kaj la libroj kun DVD sukcese fariĝis preta por vendi. Vespere okaze de la Movada Foiro, mi disdonis la reklamon pri la libro kaj fakaj kunsidoj kun s-ro Roman, f-ino Nguyen Thi Phuong (Flama; prez. de VEJO) el Vjetnamio kaj s-ro Kibe Jouhei.



Ĉe libroservo de UK, la libro kun DVD "Rakontoj el Oomoto", kiu estis verkita de eminenta pola esperantisto, Roman Dobrzyński, ekvendiĝis.



Novbakita membro de UHA, f-ino Nguyen Thi Phuong (Flama) el Vjetnamio prezidis la fakkunsidon de UHA.

Post la malferma ceremonio en la 21-a, fakkunsido de Universala Homama Asocio okazis sub la prezidado de novbakita membro de UHA, Flama. Mi transdonis saluton, kaj la filmo pri UHA estis prezentita. Sekvis mia prezento pri Interamikiĝa Evento memore al la 90-jara datreveno de EPA. Kaj s-ro Lee Jungkee el Koreio (prez. de Seula Esperanto-Kulturcentro), novselektita estrarano de UEA, parolis pri la kunlaboro kun EPA kaj s-ro Markus Gabor, membro de UHA allogis aŭskultantojn membriĝi al UHA. S-ino Mirejo el Sviso (prez. de ILEI) parolis pri Aikido kaj Oomoto.

Laste, s-ro Roman Dobrzyński transdonis prelegon sub la temo "Renkontiĝo kun Oomoto kaj ĝia allogo" kaj prezentis la libron ĵus aperintan.

Estis s-ro Renato Corsetti (Eksprezidanto de UEA, membro de UHA el Italio), f-ino Azjargal Jigjid (membro de UHA el Mongolio) kaj oomotanaj geedzoj Row de Anglujo el ĉ 40 ĉeestantoj. S-ino Oh Soon-mo el Koreio membriĝis al UHA.

En la 23-a, kadre de fakkunsido de Oomoto, kiun mi mem prezidis, filmo "Paŝoj de Oomoto" estis prezentita. Krome, amiko de Oomoto, s-ro Jo Haazen prelegis kortuŝe pri li kaj Oomoto. Laste, la filmo "Japana Printempo – Oomoto" estis prezentita dum ĉ. 43 min. Ĝi estas aldonita filmo al la libro verkita de s-ro Roman Dobrzyński. Ĝin partoprenis ĉ. 60 personoj, el kiuj estis frato de verkinto de la libro kaj s-ro Ghimire el Nepalo (Oomotano).



S-ro Jo Haazen el Belgio prelegis kortuŝe en la Fakkunsido de Oomoto.

En la 22-a kaj 24-a mi partoprenis en ekskurso organizita de UEA kaj amikiĝis kun multaj esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

Premio Onisaburo Deguĉi

La Premio Onisaburo Deguĉi de la jaro 2013 estis aljuĝita al la reta projekto



lernu.net. La estraro de UEA decidis la premiiton laŭ la regularo de la premio: "pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idealo de d-ro Zamenhof kaj al instruoj de Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj."

La premio estas "la esperantista pacpremio", kaj estis starigita per donaco de Oomoto en 1987, okaze de la jubilea jaro de Esperanto, memore al la 100-jara datreveno de ĝia publikiĝo. Ĝi estas aljuĝita ĉiujare ekde tiam. Kaj la premiito ricevas la monsumon 2000 eŭrojn kaj diplomon.

La retejo lernu.net estis lanĉita en decembro 2002. Ekde tiam amaso da homoj lernis Esperanton per la modernaj retaj rimedoj, kiujn ĝi ofertas. Jam preskaŭ 150 000 homoj ĉie en la mondo estas registritaj kiel ĝiaj uzantoj.

"Disvastigante la Internacian Lingvon Esperanto, lernu.net plenumas en unika kaj efika maniero la idealojn de la Premio Deguĉi", diris la Estraro en la pravigo de la decido pri la ĉi-jara laŭreato.

La gratulan pemiiton UEA publikigis en la malferma ceremonio de la 98a Universala Kongreso en Rejkjaviko, la 27an de julio, 2013.


Ĝojiga agado en maljusta mondo

Nuntempe pli ol 7 miliardoj da homoj vivas en la mondo kaj laŭ 2001-jaraj statistikaj datumoj de la Mondbanko mizere malriĉaj estas 1.1 miliardoj. Ili elspezas 1.25 dolarojn, aŭ malpli en tago. Relative malriĉaj estas 2.7 miliardoj da homoj, ili elspezas 2 dolarojn tage.

Malriĉeco do estas signifa socia mondproblemo en la dudekunua jarcento. La kialo de tiu problemo ne estas manko de manĝaĵo, ĉar monda agrikulturo povus produkti sufiĉe da manĝaĵo por ĉiuj homoj. La kialo de tiu problemo estas, ke en multaj landoj miliardoj da homoj ne havas monon aĉeti manĝaĵon por travivi kaj ne havas monon por eduki la infanojn. Pro tio la nuntempa maljusta mondekonomia situacio eĉ en la estonto ne havas ŝancon pliboniĝi.

En tiu senespera situacio estas grava afero, ke kelkaj internaciaj politikaj kaj religiaj organizoj emas helpi la vivon de malriĉuloj. Kelkaj oficejoj de la plej signifa internacia mondorganizo, do oficejoj de la Unuiĝintaj Nacioj havas regulan agadon por helpi solvi tiun problemon, sed ili sole tute ne povas efike fari tion. Ankaŭ la agado de multaj neregistaraj sociaj organizoj estas nepre bezonata.

Kiam mi vizitis la belan sudjapanan urbon Kameoka en junio, mi kun ĝojo konstatis, ke en la religia centro de Oomoto, Universala Homama Asocio efike laboras por tiuj celoj kaj ili intencas ĝojigi la vivon de multaj malriĉuloj en diversaj orientaziaj kaj sudaziaj landoj. Ili aĉetas manĝaĵojn por la malsatuloj



D-ro MARKUS Gabor

Komitatano "A" de UEA por Hungario

kaj ofertas skribilojn, kajerojn kaj lernolibrojn al malriĉaj infanoj helpante ilian edukadon.

Por subteni tiun gravan laboron ankaŭ mi aliĝis al Universala Homama Asocio, ĉar mi pensas, ke tiel ankaŭ mi povas iomete ĝojigi la vivon de kelkaj mizeruloj en diversaj malriĉaj landoj. La jara membrokotizo en tiu organizo estas nur dumil enoj. Tio ne estas granda sumo por homoj, kiuj hazarde pro iliaj bonŝancoj naskiĝis en alte evoluitaj industriaj landoj de la okcidenta mondo, sed tio povas savi aŭ plibonigi la vivon de multaj mizere malriĉaj homoj.

En la alte evoluitaj industriaj landoj ni ĉiam devas rememori, ke pli ol unu miliardo da homoj vivas en mizeraj vivkondiĉoj en la mondo kaj ni havas la respondecon por helpi ilin. Vidante la rezultojn de Oomoto kaj UHA en tiu tereno, mi kuraĝigas ĉiujn partoprenantojn, ke ankaŭ ili membriĝu al Universala Homama Asocio kaj helpu, ke pere de ilia agado ili ĝojigu la vivon de multaj malriĉuloj kaj iomete plibonigu la maljustan mondon en nia 21-a jarcento.

(En la Fakkunsido de UHA)

Niaj fakaj kunsidoj kadre de JEK100

—Prezentis la filmon de JEK21 en 1933—

HAZAMA Hirotomi

La 100-a Japana Esperanto-Kongreso okazis de la 12a ĝis la 15a de oktobro en Tur-Halo Hunahori, Tokio, kun 719 aliĝintoj. Inter tiuj troviĝis pli ol 40 alilandaj esperantistoj. Oomoto, Aizenkai, kaj Esperanto-Populariga Asocio havis fakajn kunsidojn: Oomoto-fakkunsido, Aizenkai-fakkunsido.

La fakan kunsidon de Aizenkai, kun ĉ. 50 ĉeestantoj, ni havis de la 16a horo kaj duono ĝis la 18a, en la ĉambro 307 de la kongresejo. La kunsidon prezidis la oficisto de EPA, OKUŬAKI Toŝiomi.

AGOU Takaŝi, la estrarano de Aizenkai



Internacia, faris malferman saluton, en kiu li parolis la historion kaj kurantan movadon de Aizenkai. Interalie li prezentis sian lastan sperton partopreni en la Konferenco preĝi por mondopaco organizita de Sankta Egidio en Romo, de la 29a de septembro ĝis la 1a de oktobro, 2013. Li emfazis, ke en tio oni uzis 7 lingvojn kun samtempaj tradukoj, tamen li sentis malfacilecon en komunikado.

Sekve ni prezentis DVD-on “La historio de Aizenkai (Universala Homama Asocio)”. Kaj TABUĈI Jasuo parolis pri la interkona kunveno okazinta en la lasta aŭgusto en la urbo Kjootango, en kio 12 mezlernejoj el Israelo kaj el Palestino partoprenis. Ili spertis japanajn kulturojn, loĝis en la hejmo de japanaj urbanoj, kaj turismis. Pere de tiuj programeroj ili por la unua fojo spertis la veran senbatalajn pacajn tagojn.

D-ro MARKUS Gabor el Hungario parolis al ĉeestantoj aliĝi al Aizenkai. La 4-gea koruso “Ĉielo” el Oomoto (la reprezentanto: SAITOO Jasuko) per 26 membroj kantis kantojn: “La Espero”, “Vekiĝo” (versita de DEGUĈI Onisaburo), “Hejmloko” (por-infana kanto).

La Oomoto-fakkunsido okazis de la 13a kaj 10 minutoj ĝis la 14a kaj 40 minutoj en la tago 14a, en la ĉambro por kurso. La kunsidon ĉeestis ĉirkaŭ 100 partoprenantoj. AGOU, la

ĉefdirektoro de EPA, salutis por la malfermo kaj parolis pri Oomoto. Ni prezentis DVD-on “La historio de Oomoto”. Gesinjoroj Joel Amis, Ĵenja Amis, LEE Jungkee (Koreio, Estrarano de UEA), ĉiu parolis pri “Oomoto kaj Mi”.

La arkivan filmon “La 21a Japana Esperanto-Kongreso” kaj “10-jara jubileo de EPA” ni prezentis. La filmo estis eltrovita jar-komence de 2013 en la arkiva fako de Oomoto.

En la filmo oni vidas esperantistojn ĉe la akceptejo de tiama kongreso. Oni vidas kaj memorfotadon antaŭ Gekkuuden (La Lunpalaco) kaj bankedon okaze de la 10-jara jubileo de EPA. Ni ankaŭ trovas La Majstrojn DEGUĈI Onisaburo kaj DEGUĈI Hidemaru; eminentajn esperantistojn: s-roj OSAKA Kenĵi, JAGI Hideo, ŜIGEMACU Takizoo, JURI Tadakacu; kaj konatajn oomotanajn esperantistojn: NIŜIMURA Koogecu, KATOO Haruko, ITOO Eizoo.

OKUŬAKI informis pri la libro “Rakontoj el Oomoto”, verkita de Roman Dobrzyński, eldonita en la lasta aŭgusto. Antaŭ la fermo de la kunsido, la koruso “Ĉielo” kantis la tri kantojn esperante.

Cetere, membroj de EPA kontribuis por la kongreso en kelkaj kunsidoj: HUĴIMOTO Hideko gvidis por alilandanoj "Spertu Japanajn Kulturojn", Te-ceremonion, kaj TABUĈI Jasuo gvidis la programeron “Danco kaj kantoj” kaj instruis Aŭdancon. OKUŬAKI kaj SUZUKI Rintaroo en la programero “Interkonatiĝa Vespero” prezentis Utajon “Takasago” (OKUŬAKI),



la solon per ŝultro-tamburo de noo (Suzuki), ŝimajon “Curukame” (SUZUKI) kun la utaado de OKUŬAKI.

JAMAMOTO Akiko, la estro de la EPA-filio “Orienta Lumo”, laboris kiel LKK-ano, por organizi la kongreson. Ŝi prizorgis la okazigon de interamikiĝa evento en Tokia Centro de Oomoto en la 13a kun la ĉeesto de 12 eksterlandaj esperantistoj el Koreio, Kanado, Hungario kaj Irano.

La 1a Japana Esperanto-Kongreso okazis en la 28a de septembro, 1908, en la Junulara Domo, en Mitoŝiro-ĉo, Kanda, Tokio. Kaj krom de 1908 ĝis 1915, kaj krom 1944, la kongresoj daŭre okazis, kaj en la jaro 2013 japanaj esperantistoj havis la 100an kongreson denove en Tokio. La unua kongreso de la dua jarcento okazos en la urbo Obama, gubernio Hukui, de la 11a ĝis la 13a de oktobro, 2014.

Geamikoj parolis pri Oomoto en la Fakkunsido de Oomoto

Kadre de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso, Fakkunsido de Oomoto okazis en la 14-a de oktobro. Lee Jungkee (Koreio, Estrarano de UEA) kaj ges-roj Joel Amis, Ĵenja Amis parolis pri Oomoto. Jen estas paroloj de geamikoj.

Mi kaj Oomoto (1)



LEE Jungkee (Koreio)

Li estis elektita kiel unu el estraranoj de UEA okaze de la 98-a UK en 2013.

Saluton!

Vere Oomoto multe kontribuas por nia movado. Unue, kiel vi scias premio Deguĉi, kiun UEA premias ĉiujare en UK. En tiu ĉi jaro "Lernu.net" estas premiito. Kaj, fakte mi volas diri, ke premio Deguĉi estas la premio Nobelo en Esperantujo.

En la jaro 2010 la sesa Azia Kongreso okazis en Mongolio. Vere tiam Mongola Esperanto-Asocio ankoraŭ ne estis preta por okazigi

internacian kongreson. Tiam prezidento de KAEM estis mi. Do, mi ne povas dormi pro zorgo, kiel ni okazigos Azian Kongreson en Mongolio kaj kun kiuj. Mi maldormis. Kaj finfine, mi decidis, ke mi petu helpon de Oomoto.

Mi riverencis al Majstrino DEGUĈI Kurenai kaj mi klarigis la situacion kaj petis helpon. Feliĉe via Gvidantino volonte akceptis mian peton kaj sendis s-ron Agou al Mongolio por instrui Esperanton. Vere dank' al Oomoto, via Gvidantino kaj Agou, mi povis okazigi kongreson sukcese. Post kongreso oni unuvoĉe diris, ke ĝi estis tre bela kaj tre perfekta kongreso. Fakte tiu anekdoto estis kaŝita. Tamen mi publikigas tion, ĉar Oomoto ombre tiel multe kontribuas por nia movado.

Mi mem ĝis hodiaŭ ĉirkaŭ pli ol 300 koreajn esperantistojn akompanis al Kameoka por komuna lernado de Esperanto. Tio donis tre grandan kaj bonan impreson al koreoj. Honeste dirite, nuna rilato inter du landoj ne estas glata. Tamen mi pensas, ke koreoj, kiuj partoprenis en la kurskunveno en

Kameoka, havas bonan impreson pri Japanio kaj pri japanoj.

Estas notinde, ke antaŭ du semajnoj, budhismo en Tibeto, fakte mondskala budhisma organizaĵo oficiale akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon. Tial s-ino Eruda Li el Ĉinio vizitis Tibeton por plikonkretigi, kiamaniere enkondukigu Esperanton al tiu budhisma organizaĵo. Tamen jam antaŭ 90 jaroj, en la jaro 1923 Oomoto oficiale akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon. Fakte Oomoto estas modelo en religia kampo. Probable tiu tibeta budhisma organizaĵo ankaŭ devos lerni de Oomoto.

Tiamaniere Oomoto kun Esperanto-Populariga Asocio multe kontribuis por nia movado. Pro tio kiel nove elektita estrarano de UEA, mi kore dankas kaj esperas pluan kaj plian progreson de Oomoto kaj EPA.

Mi kaj Oomoto (2)

Joel Amis (Kanado)

Administra Direktoro de ESE, el Kanado

Mi konas la vorton "Oomoto" preskaŭ ekde la komenco de mia esperantisteco. Mi memoras vidi anoncon por la revuo Oomoto en alia gazeto. Sed tiutempe mi sciis malmulton pri ĉi tiu religio. Mia unuafoja persona konatiĝo kun Oomoto okazis, kiam mi loĝis en Japanio laborante, kiel instruisto de la angla lingvo antaŭ ĉirkaŭ 12 jaroj. Tiam mi vizitis la Oomoto-Centron. Mi vere miris,

ke tia ŝajne malgranda religio povas havi tiel grandan, multaspektan kaj multifacetan influon en Japanio kaj tra la mondo.

Ekde tiu momento Oomoto tre interesis min. Sed post du jaroj en Japanio mi reiris al Usono (nun loĝas en Kanado), kaj do havis malmultajn okazajn kontaktiĝi kun Oomoto.

Tamen dum nia lastjara vizito al Japanio en aŭgusto 2012, mi renovigis mian rilaton kun Oomoto. Kaj estas interese, ke ĝuste dum tiu tempo mi estis pripensanta repreni miajn studojn. Mia fako estas religia scienco, sed mi ne havis ideon, kiu povas esti la temo de mia magistra tezo. Tamen dum nia restado en Kameoka kaj poste en Ajabe, la inspiro venis – tiam certis, ke mia tezo devos esti pri, aŭ rilati al, Oomoto. Do, pro tio, post ĉi tiu kongreso ni iros al la Oomoto-Centro en Kameoka kaj tie pasigos plurajn semajnoj por pli bone kompreni Oomoton kaj kolekti materialojn por mia verko.

Mi volas danki unue al Oomoto ĝenerale, pro ĝia ekzisto kaj pro ĉio, kion Oomoto realigas en la mondo por antaŭenigi pacon, universalan homamon kaj amikecon inter popoloj kaj, eĉ pli grave, inter religioj. Mi volas speciale danki al s-ro Agou kaj la Internacia Fako de Oomoto, pro ilia afabla akcepto gastigi nin tie kaj kunlabori kun mia modesta projekto. Kaj ankaŭ al s-ro Okuŭaki, kiu helpas min diversrilate kaj ĉiam respondas miajn multajn demandojn. Li estas mirinda helpanto! Koran dankon!

Mi kaj Oomoto (3)

Yevgeniya (Ĵenja) Amis (Kanado)

Direktoro pri Disvolvado de ESF, el Kanado

Saluton!

Mi unue konatiĝis kun Oomoto pere de Oomotanoj, ĉar mi havis personajn kontaktojn kun kelkaj Esperantistoj, kiuj estas Oomotanoj. Tiu ĉi unua impreso estis ege ege bona. Unu el tiuj personoj fariĝis mia amiko, s-ro Etsuo Miyoshi. Mi memoras, ke antaŭ proksimume dek jaroj li sendis al mi unu el siaj bastonvalizoj kiel donacon. Tiu gesto de bonkoreco tiam tuŝis kaj impresis min. Pasintjare, kiam mi havis la bonŝancon viziti Oomoton kaj ankaŭ s-ron Miyoshi, mi denove dankis lin pro tiu donaco, kaj li ne plu memoris, ke li sendis al mi tiun donacon. Mi volas diri, ke tiuj gestoj de bonkoreco kaj de bonvolo por ĉiam restas en la koroj de homoj, kiuj ricevis ilin, eĉ kiam ni mem forgesis pri ili. Pro tio, tiuj bonaj agoj kaj bonaj vortoj de Oomotanoj kaj Esperantistoj restas por ĉiam en niaj koroj.

Aldone al miaj personaj amikoj-Oomotanoj, mi kiel esperantisto, kompreneble, multe legis pri Oomoto, ĉar Esperanto ja estas parto de Oomoto, sed Oomoto estas parto de Esperanto. Mi legis multajn informojn pri Oomoto pere de esperantaj revuoj kaj eĉ antaŭ ol mi venis al Kameoka kaj Ajabe, mi jam havis tre pozitivan ideon pri Oomoto kaj ĝiaj idealoj. Kaj, kompreneble, kiam

mi vizitis Kameoka-n kaj Ajabe-n, tiuj jam akiritaj ĉiuj bonaj impresoj konfirmiĝis kaj pligrandiĝis. Dum mi parolis kaj kunmanĝis kun Oomotanoj, mi lernis pli pri Oomoto. Fakte, mi lernis, ke ankaŭ miaj personaj kredoj tre akordiĝis kaj konformiĝas kun tiuj de Oomoto. Mi ne estas Oomotano. Sed mi kredas, ke ĉiuj religioj devenas de la sama fonto. Mi kredas, ke ĉiuj homoj estas partoj de unu sama Dio, de la sama universo. Pro tio mi sentas spiritan fratecon kun Oomoto kaj ĝiaj instruoj.

Mi estas ankaŭ tre impresita de tre diversa kaj tre multaspekta agado de Oomoto. Estas ĝuste tiuj konkretaj agadoj, kiuj havas multe da efiko. Hieraŭ ni aŭskultis la prelegon pri la interamikiĝo inter palestinanoj kaj hebreoj, izraelanoj, pere de Oomoto. Do, ĝuste tiuj praktikaj agadoj antaŭenigas la pacon, ĉar la paco ja komenciĝas je la nivelo de unu persono. Mi dankas al Oomoto pro tiu ĉi agado.

Alia flanko de Oomoto estas, ke por mi persone, Oomoto estas mia fenestro al Japanio. Pere de Oomoto mi lernis multajn aferojn pri Japanio, kiujn antaŭe mi ne sciis. Mi unuafoje spertis te-ceremonion kaj mi vidis kaligrafion, kaj lernis multon. Mi volas danki Oomoton pro ĉiuj iliaj agadoj kaj pro tio, ke ili bonkore akceptis nin.

Dankon!

Mezorianta Paca Projekto

Internacia kaj kompreniĝa en Kjotango

TABUĈI Jasuo

Rememorante mian travivaĵon en la lasta somero, mi sentas min treege feliĉa! Ĉar mi povis ludi la rolon de volontula interpretisto de la angla lingvo kaj helpanto de la Mezorianta Paca Projekto en Kjotango kaj mi spertis, sentis kaj lernis multon el ĝi.

(I) Skizo

Unue mi mencias skizon ; kiam, kie, kiu, kial, kio, tagordo kaj lingvo

Kiam : de la 7-a ĝis la 13-a de aŭgusto

Kie : la urbo Kjotango en Kioto-gubernio kaj Tokio

Kiu : 5 Palestinaj kaj 5 Israelaj studentoj kaj 2 kondukantoj estis invititaj

Kio okazis? :

(i) restado kaj kunvivado de studentoj 1 Palestina studento kaj 1 Israela studento estis akceptitaj al 1 japana familio kaj kunvivis

(ii) interkulturaj kaj kompreniĝaj eventoj

(iii) ĵurnalista intervjuo

(iv) vizito al Ĉefministro de Japanio Ŝinzo Abe en la Oficiala Domo en Tokio

Kial (Celo):

(i) inviti Palestinajn kaj Israelajn studentojn kies familianoj estis moritigitaj envolvite de

terorismo aŭ batalo kaj doni al ili ŝancon por interamikiĝo kaj kompreniĝo

(ii) rekoni gravecon de paco

(iii) fari kontribuon al paco

Tagordo :

la 7-an de aŭg. : atingi Kansai-Flughavenon

la 8-an : renkontiĝo kun gastigantaj familioj

la 9-an : (i) bonveniga ceremonio

(ii) spertado kanui

(iii) surmeti jukaton kaj sperti te-ceremonion

(iv) spektado de fajraĵo

la 10-an : (i) interamikiĝo kun lokaj studentoj

kaj lokaj civitanoj

(ii) ĵurnalista intervjuo

(iii) adiaŭa vespermanĝo

la 11-an : (i) forlasi Kjotangon

(ii) viziti "Disneyland"n kun lokaj studentoj el Kjotango

la 12-an : (i) viziti la oficialan domon de

Ĉefministro de Japanio en Tokio por esprimi respekton

(ii) turismo en Asakusa kaj Odaiba
en Tokio

la 13-an : (i) reiri hejmen de la flughaveno
Haneda

lingvo : Hejme Palestinanoj parolas arabe
kaj Israelanoj hebree sed la lingvo kiun ni
komune uzis en Japanujo estis la angla.

(II) Kio impresis min?

Diversaj aferoj impresis min dum unu
semajno sed mi deziras mencii jenajn tri
punktojn; Nur kaj Amal en japana familio
Asada, ĵurnalista intervjuo, agado de
vizitantoj kiel unu grupo.

Pri Nur kaj Amal en japana familio Asada

Nur, Israela 16 jaraĝa knabo, kaj
Amal, Palestina 18 jaraĝa knabino, havis
interamikiĝan tempon por interkompreniĝo
en familio Asada.

S-ro Jano (administranta direktoro de NPO
de Paco-Instituto pri Israelo kaj Palestino)
kaj mi (Tabuĉi) vizitis la hejmon de familio
Asada en la 9-a (vespere). Ni demandis kaj ili
respondis.

Demando: Kio estas via sonĝo?

Nur: Paco en Israelo kaj Palestino kaj paco en
la mondo!

Amal: Neniom da batalo plu!

Demando: Kial vi decidis veni al Japanujo?

Nur: Por sperti Japanan kulturon kaj paroli
kun Palestinaj amikoj.

Amal: Por paroli kun amikoj.

Nur: Mi havas dekstrulajn amikojn kaj ankaŭ
aliajn amikojn kiu deziras pacon.

Temas pri paca negocio, ni komencu per
malgranda afero, mi pensas.

Demando: Kion vi volas paroli revenonte
hejmen?

Nur : Paco estas ekzistebla!

Amal: Paco estas realigebla kaj japanoj estas
tre helpemaj.

Nur (Israela studento) skribas pri lia familia histrion

“Mi perdis mian onklon en la 4-a
Mezoriento-Batalo. La onklo estis pli aĝa
frato de patro. Mia patro deziris venĝon kaj
daŭrigis politikan agadon kiel dekstrulo.
Sed poste li rekonsideris sian politikan
agadon kaj konkludis ke ĉiuj Palestinoj ne
estas samaj. Leginte librojn, li analizis, ke
Palestinanoj havas rajton starigi sendependan
landon, kaj ke batalo kaj perforto ne alportas
solvon. La solvo estas atingebla nur per paca
negocio. Patro parolis pri sia opinio al mi de
miaj infanaj tagoj en la maniero kiu igas min
kompreni sufiĉe bone.”



S-ro Nur el Israelo kaj f-ino Amal el Palestino

Amal (Palestina studentino) skribas pri la historio de familio

“Israelaj soldatoj vundis mian fraton kaj mian onklon, kiu ankoraŭ nun suferas sekvaĵon. Mia avo mortis en kontrolejo “Beitumar”. Saneco de malmanstato de mia avo malboniĝis kaj familianoj intencis porti lin al la hospitalo, sed Israelaj soldatoj restigis lin kaj liajn familianojn en la kontrolejo dum pli ol 1 horo. Poste mia avo mortis pro koratako sur la vojo al la hospitalo. Alia onklo estis mortigita de Israela soldato.

Mia patro aliĝis al la Asocio de Familianoj de Mortintoj. La agado de la asocio donis grandan influon al mia patrino kaj avino. Nun ili serĉas bonan solvon por ambaŭ flankoj! ”

Gastiganto, Asada-Familio havis deziron, ke Nur kaj Amal kaj tutaj familanoj havu komunan memoraĵon aŭ sperton! S-ino Asada kaj s-ro Nogi (prizorganto, oficisto de Urbo Kjotango) cerbumis kaj decidis kaj praktikis unu ideon; ili kune supreniru la monton Tenkou, ŝvitante, parolante kaj kuraĝigante unu la alian.

Ankaŭ mi spertis supreniradon de la monto kaj havis neforgeseblan remomoron kun ili. Marŝado sub la somera sunlumo estis peza laboro kaj ni marŝis kaj marŝis parolante, kuraĝigante reciproke. 30 aŭ 40 minutoj da suprenirado.... kaj finfine post unu horo ni povis atingi monto-supron. Ni ripozis kaj forviŝis ŝviton.... S-ino Asada preparis vastan blankan paperon kaj skribilojn. Ni

unu post la alia skribis mesaĝon kaj pentris jene, “Monda Paco! Unu Nura renkontiĝo en nia vivo! Mi laĉiĝis! Kiam vi reiris hejmen, bonvole rememoru japanojn kiuj pripensas pri vi. ”



Montogrimpado kun gastigantoj

Ĵurnalista intervjuo

De la 17-a horo en la 10-a, ni havis komunan ĵurnalistan intervjuon en Aziŭaino-sato en la urbo Kjotango. Ĉeestis ĵurnalistoj el Kioto-filio de NHK (Nippon Hoosoo Kjookai = Japana Dissenda Korporacio) kaj el ĵurnaloj Mainiĉi kaj Kioto.

Unue studentoj parolis sian impreson de la vivo kaj sperto en Japanujo kaj poste ĵurnalistoj demandis kaj ili respondis. Jen estas parto de la intervjuo.

(P= Palestinano I=Israelano)

Dima (P) : Mi esprimas dankemon al homoj kiuj akceptis min varme, precipe al gastiganta familio.

Omer (I) : Mi elkore dankas vin pro bonkora invito. Se mi havos ŝancon, mi refoje volas

viziti.

Balqees (P) : Japanoj estas graciaj. Ili bonvenigas kaj akceptas nin varme! Japanoj estas bone edukitaj kaj pacamaj kaj deziras pacon de la mondo.

Mi pensas, ke homaj rajtoj de ni Palestinanoj ne estas protektataj.

Demando : Kion vi lernis, kion vi rimarkis kaj kion vi volas kunporti al via hejmo?

Yuval(I) kondukanto : Mi rimarkis, ke japanoj konfidigas unu la alian. La baza problemo en nia lando estas la manko de reciproka konfido. Tial paco ne venas al nia lando.

Yarden(I) : Japana kulturo kaj kutimo diferencas de nia kulturo kaj kutimo. Sed, ni Israelanoj kaj Palestinanoj havas multajn similajn punktojn. Ekzemple, manĝaĵoj kaj tiel plu.

Tomer(I) : Mi sentis en Japanujo ke ĉiuj homoj estas samaj kiel homoj kaj paco estas realigebla.

Nur(I) : Mi pensas, ke paco estas ekzistebla kaj ni povas realigi pacon.

Omer(I) : Japanoj respektas unu la alian. Mi pensas, ke paco estas realigebla.

Wajeeh(P) kondukanto : Israelanoj, kiuj okupas kaj Palestinanoj, kiuj estas okupataj... Ni ne estas en la sama areno. Tial paco estas malfacila. Tio ne estas problemo de religio, kaj tio estas problemo de politiko. Se ni ne havas la egalan rajton, paco ne estas realigebla.

Yuval(I) kondukanto : Ĉi tiuj 10 gejunuloj estas tre bravaj. Ĉar ĝeneralaj Israelaj kaj Palestinaj

gejunuloj ne povas pasigi tempon en ĉi tiu maniero.

Mi estis ege impresita ĉar ĉiuj gejunuloj diris, ke paco estas realigebla, kvankam ili bezonas tempon.

Agado de vizitantoj kiel unu grupo

Mi rimarkis, ke en la bonveniga ceremonio, kaj en ĵurnalista intervjuo Palestinaj kaj Israelaj studentoj sidis mikse. (En la 2003-a kaj 2010-a projekto, ili sidis aparte: unu grupo estis Palestina kaj la alia estis Israela.)

Yuval, kondukato de la Israela grupo, diris en la saluto de Bonveniga Ceremonio en Kjetango, "Ni venis al Japanujo ne kiel du grupoj sed kiel unu grupo." Dum la aŭtobus-vojaĝo de la Flughaveno Kansai ĝis Kjetango mi rimarkis, ke kondukantoj igis studentojn en 5 grupojn kaj paroli pri la familia historio; kiu, kie, kaj kiamanere iliaj familianoj mortis dum 15 minutoj, kaj post la fino de konversacio aliaj novaj paroj komencis paroli. Kaj tiel daŭris kompreniga konversacio.

Alia ekzemplo estas ke studentoj kune partoprenis en mia prezentado de AŬA-DANCO. En la adiaŭa vespermanĝo kun gastigantaj familioj kaj koncernantoj de Kjetango. Studentoj ĝoje, amuze kaj kune dancis kiel unu grupo en rondo.

Do, mi demandis kial? Mi cerbumis, ke ili havas komunan deziron, kaj ke ili ne plu volas tragedion de aliaj familianoj pere de terorismo aŭ batalo.

(III) Konkludo

La vojaĝo al Japanujo, renkontiĝo kun gastigantaj familioj, urbestro de Kjetango kaj oficistoj kaj studentoj el lokaj altlernejoj, prizorgantoj, la Ĉefministro de Japanio Ŝinzo Abe kaj aliaj homoj igis ilin plenplena de emocio, larmo, ĝojo kaj dankemo. La vojaĝantoj sentis la varman koron de japanoj. Kaj ili neniam forgesos la ekziston de japanoj,

kiuj ĉiam pripensas pri ili. Kompreneble mi estas unu el ili. La Paca Projekto fariĝis mia traviva laboro. Mi deziras labori kaj preĝi por paco en Palestino kaj Israelo tutkore kaj tutanime de nun ankaŭ. Ĝis la reveno en Israelo kaj en Palestino kaj en Kjetango!

(En la Fakkunsido de UHA li prezentis la projekton.)



S-ro Tabuĉi(dekstre) kun studentoj el Palestino

La Sankta Egidio organizis la 27-an Internacian Kunvenon por Paco

Temo: Kuraĝo al Espero; Religioj kaj Kulturoj en Dialogoj
Dato: De la 29-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro, 2013, en Romo

La 5-a Fakkunsido (en la 30-a tago de septembro)

Temo: Espero kaj Paco; Religioj en Japanio

Fare de la praktiko de “Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo”

Estro de Internacia Ambona Instrufako de Oomoto
Direktoro de Universala Homama Asocio Internacia
Administra Direktoro de Esperanto-Populariga Asocio
AGOU Takaŝi

Saluton karaj gesamideanoj!

“La Esperanta Ŝtonmonumento” estis starigita memore al la 40-jara datreveno de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio(EPA) kiel la satelita organizo de Oomoto, ĵus antaŭ 50 jaroj en la Centra Sidejo de Oomoto, Kameoka. Sur ĝi gravuriĝas la devizo de Oomoto “Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo” per internacia lingvo Esperanto.

Tiu ĉi epigrafo simple esprimas la celon de la agadoj de Oomoto, por realigi “Mirokuno-jo”, la idealan mondon sur la tero kiel herolde disvolviĝantaj tri agadoj enlande kaj eksterlande.

Enirinte en la 21-an jarcenton, kiam la mondo tiom pli fariĝas tergloba, homaj individuaj vivoj en propraj landoj nun ne sole konsistebblas; ni, oomotanoj konsideras tiel ke, tiu ĉi universalecaj agadoj estas des pli postulataj al homaro.



Samtempe, mi prezentos ĝin, dezirante ke tiu ĉi devizo de Oomoto eblus fariĝi konkreta propono al la ĉeftemo de tiu ĉi internacia kunveno “Kuraĝo al Espero: Religioj kaj Kulturoj en Dialogoj”.

Unue, mi temas pri Unu Dio. La majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto fondis la Mondan Religian Kunligon, kunlabore kun Taoismo, Budhismo, Islamo kaj Katoliko, kiel unu el la provoj por monda paco en Pekino, Ĉinio en 1925. Tiu ĉi estas la realigo de “Interreligiaj Agadoj” surbaze de la fundamentaj ideoj de Oomoto kiel

“Universala Homamo” “Ĉiuj religioj originas el sama fonto”.

Okaze de ĝia inaŭguro la majstro DEGUĈI Onisaburo forte akcentis la neceson de la solidareco inter religiuloj.

“Por alporti al ni la mondan pacon kaj feliĉon de homaro nepre necesas la harmoniigo de homaj koroj kiel antaŭdecidinda problemo. Por plenumi ĝin mondaj gefratoj unuiĝu kaj kune faru misian administradon ĉielan kaj teran pere de la instruoj. Se oni intencos unuigi la mondon fare de armita forto kaj aŭtoritata potenco, neniam ĉesos la tumultoj kaj nerealigeblos inviti eternan pacon al ni, kaj ĉar la alia flanko intence subpremos ĝin. Tial, oni nepre necesas progresigi la procedojn spirite, religie kaj molare por la unueciĝo de homaro.”

Ĉiuj bonaj religioj, eĉ se iliaj esprimoj kaj instrumanieroj estus diferencaj inter ili, alvenos al Unu Dio (la plej suprulo), nur se ili retroiros al la plej entenata fundo de iliaj koroj.

Fakte, tiu ĉi ideo “Ĉiuj religioj originas el sama fonto” ne estis akceptita de la socio en 1920-aj jaroj. Tamen, nun, kiam estas nomata “la tergloba epoko” en la 21-a jarcento, ni perceptis nin tiel, ke tre multiĝas la homoj kiuj simpatias kun tiu ĉi ideo enlande kaj eksterlande.

Aliflanke, ni vidas tion, ke “la kunfrapiĝoj de civilizoj” timigas nin dum longa tempo. Pro tio ni nun elkore deziras, ke “Religia Unuiĝinta nacio” (Tutmonda Religia Ligo) realiĝus eĉ unu tagon pli frue, alvokante la urĝecon de la interreligiaj paciĝoj, kunlaboroj

kaj kunorganizoj.

Sekvante, mi temas pri Unu Mondo. Post la 2-a Mondmilito d-ro Albert Einstein kaj aliaj sciencistoj proponis iniciati Mondo-Federacian Movadon, kiun alprenis la majstrino DEGUĈI Sumilko, la Dua Spirita Gvidantino de Oomoto en 1949.

Tuj post la 2-a mondomilito iu japana ĵurnalisto demandis al la majstro DEGUĈI Onisaburo pri japana malvenko.

Li respondis, “Nun, tute neniĝis japanaj armiloj; tio inkluzivas la respektindan mision kiel la pioniro de tutmonda paco. Vera mondopaco unuafoje efektiviĝos sur la tero tiam, kiam la armiloj sur la tuta mondo nuliĝos, kaj al ni alproksimiĝas tia tempo.”

Post la 2-a mondomilito japanaj religiuloj fervore agis por Mondo-Feceracia Movado, trans la landolimoj kaj nacianecoj, kun la celo al la efektivigo de justeca eterna paco sen militoj fare de la kunlaboroj kun aliaj religiuloj, konsiderante ne havigi al ni, homaro, denove tiel mizeran hororon, surbaze de la spertoj de atombombiĝoj en la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako.

La 2-an de aŭgusto, 2005, la historia decido estis alprenita de japana parlamento tiel ke la Mondo-Federacio estu kiel la regna principo. “Sub la ideo de eterna paco, kion japana konstitucio lanĉas, kiel unu sola atombombita lando, japanio devas maksimume klopodi por malfermi la futuron de homara kunvivo daŭrigebla, mano en mano kun ĉiuj homoj en la mondo; por nuligi atomarmilojn, eviti ĉian ajn militon kaj esplori la vojon de la organizo de Mond-federacio.

La mondfederacio estas la plej lasta ideo por punkti homaran historion kiu militadis tage kaj nokte. Kio estas la konkreta futura projekto, tio estas la premiso sendependa de batalforto, sed de leĝo, ĉiuflanke neante la militon kiel la solvrimedon de internaciaj konfliktoj.

Tiu ĉi solvos komunajn taskojn por la tuta homaro kiel ekzemple popolnombro, naturaj provizaĵoj, medio, sekurigo ktp. por plimulti la bonfarton de homaro; inkluzive de la starigo de Mondfederacia Registaro, parte cedante nacian rajton establo de la monda leĝo, popola kunveno por la mondo, starigo de la monda juĝejo, senarmigo kaj sekurigo per policarmiloj tenataj laŭ la monda administrado. La internacia kriminala juĝo realiĝis laŭ la regularo de Romo. Tio donas al ni, mondo-federacioj, grandan ĝojon.

Nun, kiam la homaro bonvenigas al si "la tempon de la terglobo", la konstruo de la enkadro "la mondfederisma ordo en la mondo" estas nepre necesa saĝeco por homara supervivo sur la tero. Ŝanĝante la okupadon de "per forto" al "per leĝo", kun maksimuma respektado al ĉiulanda aŭtonomio en estonta socio, la homaro celu al paca kunvivado, rekonante la diversecon de la kulturoj.

La tria temas pri Unu Interlingvo. En la jaro 1887 estis publikigita Internacia lingvo Esperanto, kies populariga movado ne estas la movado por unuecigi la mondon per Esperanto. Ĝia ĉefa celo estas utiligi Esperanton kiel neŭtrale justan komunan

lingvon por la homaro, estimante respektivajn rasajn kaj naciajn lingvojn.

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu estas iniciatinto de Esperanto, naskiĝis en Bjalistoko, en la orienta urbo de Pollando (tiam rusa teritorio). Liaj gepatroj estas judoj, kaj la patro estis la instruisto de la germana lingvo. En lia familio ili pole parolis, tamen ekstere estis jide parolita en juda kvartalo. En lernejoj studentoj edukiĝis ruse.

Tiam, en la urbo Bjalistoko estis "krisolo de nacioj", kiel poloj, la majoritata loĝantaro de la urbo; germanaj inĝenieroj, judaj komercistoj kaj rusaj municipoficistoj.

Ĉar, ili ne nur individue parolis diferencajn lingvojn, sed ankaŭ iliaj religioj estis diferencaj unuj kontraŭ la aliaj. Aldone al tio naskiĝis la bataloj inter riĉuloj kaj malriĉuloj, influite de la ondo de la industria revolucio.

Sub tia socia situacio d-ro Zamenhof ne povis konsideri internacian komunan lingvon tiel, ke ĝi estas simpla oportuna ilo por komunikado, aŭ la problemo por la interplektado inter literoj kaj sonoj.

La devigata figuro de internacia komuna lingvo estas por li ne diskriminacii homon fare de homo mem, kaj samtempe, ĝi estu la rimedo por progresigi veran paciĝon inter la nacioj. Temante pri harmonio inter nacioj kaj popoloj, mi kredas, ke ĝi neniam realiĝos fare de la trudo flanke de la reganto, sed per la kunligiteco de malfortuloj kaj turmentitoj.

Antaŭe, profesoro UMESAO Tadao, la unua direktoro de la Nacia Etnologia Muzeo de Japanio kaj e-isto, verkis tiel

sugestoplenajn vortojn: “Estas ne elteneble akcepti la realon de tiuj homoj, kiuj parolas kun malgranda nombro, inhibiciitaj kaj forigitaj fare de apenaŭ unu manpreno da lingvaro, nombre fieranta superregon. (kaj ceteraj). Malgraŭ tio, ke Esperanto estas altnivele praktikebla, mi pensas, ke ĝi devus esti evoluigota kiel la spirita movado por la tuta homaro, dise de la pragmatismo (Monata revuo “Lingvo” en oktobra numero, 1983, eldonita de librovendejo de Taiŝuu-kan).

En junio, 1923, la majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto, kiu enkondukis Esperanton en Oomoton, versis jenajn utaojn (mallongajn poemojn).

Jen, sen konsider’
al landoj kaj popoloj,
sur la tuta ter’
serene trasonoras
la parol’de Esperant’

Dank’ al Difavor’,
la disvastiĝ’ de l’ sankta
instruaro de
l’ homaro, realiĝas
per la lingvo Esperant’.

Ĝuste Esperant’
kun forta influo
de la vortanim’
ja iĝas granda helpo
por la nobla misiad’.

Nu, amikoj, vi
rapide disvastigu

lingvon Esperant’
por igi lumoplena
nian mondon de l’ mallum’.

En tiu ĉi junio nia Esperanto-Populariga Asocio(EPA) bonvenigis sian festotagon de la 90-jara jubileo de la fondiĝo. En ĝia ĉefa internacia evento, kiu solene okazis por firmigi amikecojn, partoprenis 300 enlandaj kaj 35 eksterjapanaj partoprenantoj el 6 landoj.

Koncerne al ĉi-foja internacia evento de Sankta Egidio kun la temo “Kuraĝo al Espero — Religioj kaj Kulturoj en Dialogoj”, ni e-istoj modeste daŭrigas la agadojn, esperante uzi Esperanton kiel “la dua nacia lingvo” por homaro, kiu pacience tenadas sian praktikecon dum 127 jaroj, respektante ĉies naciajn lingvojn kaj kulturojn okaze de internaciaj interfluo.

Ĉar, ni, oomotanoj forte sentas tiel, ke la populariga agado de Esperanto, en kiu troviĝas la interna ideo, nomata “Homaranismo” “Universala Frateismo” “Universala Homamismo”, devas esti konkreta agado por realigi mondan pacon sur la tero.

Koran dankon pro via aŭskultado!

Tri plenaj semajnoj en Oomoto


Ĵenja Amis, Ukrainio / Kanado

Geedzoj Joel Amis kaj Ĵenja Amis restis en Oomoto-Centro tuj post la 100-a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio (de la 15-a de oktobro) ĝis Aŭtuna Granda Festo kaj la Festo por Fondintino (la 8-a de novembro). Ili ankaŭ pasintjare pasigis tempon en la Centro kaj la raporto pri restado en Japanio verkita de Ĵenja aperis en revuo de JEI. Jen estas ĉifoja raporto de ŝi.

La unuan semajnon ni pasigis studante en biblioteko de Oomoto – vera trezorejo, kie konserviĝas ĉiuj revuoj kaj libroj rilataj al Oomoto. Bonŝance por ni, kiuj ne parolas la japanan lingvon, multaj materialoj ekzistas en Esperanto, angla kaj kelkaj aliaj okcidentaj lingvoj (kiel redaktoro, mi ne povis ne rimarki la bonan kvaliton de la enhavo kaj lingvaĵo de la malnovaj revuoj de Oomoto!). La laborantoj de Oomoto estis ekstreme helpemaj kaj ĉiam helpis elserĉi la bezonatan materialon en arkivoj kaj diversmaniere konsilis.

Por doni nur unu etan ekzemplon – en unu doktora verko pri Oomoto ni trovis unu citaĵon, tre rilatan al la esplor-temo de mia edzo. Ni vane provis trovi ĝian originalan fonton kaj por momento ni eĉ pensis, ke la citaĵo eble ne estas ĝusta. Finfine ni komprenis, ke la citaĵo ja estas bona, sed tiu revuo, kie ĝi aperis, estas ege malnova kaj pro tio ĝi konserviĝas ne en la biblioteko, sed en la konservejo: la konstruaĵo, kiun oni ne kutime vizitas por ordinara esploroj kaj kie konserviĝas ne nur la plej malnovaj revuoj kaj libroj, sed ankaŭ diversaj valoraj objektoj ligitaj al la historio de Oomoto.

Fakte, la konstruaĵo mem estas trezoro,



En kurso de Bajŝou-Ĵuku
(Akademia Lernejo de Oomoto)
S-ino Ĵenja Amis estas la tria de dekstre.

konstruita speciale por esti perfekta arkivejo: ĝi ne havas fenestrojn, estas fajroimuna kaj tra la jaro konservas la saman temperaturon kaj humidecon. Kutime oni eniras en tiun konstruaĵon nur dufoje jare por purigi kaj aerumi, sed speciale por ni oni faris escepton: oni invitis nin al la konservejo por foti nur unu paĝon de unu malnova revuo!

En la dua semajno ni faris pli ol dekon da longaj intervjuoj kun laborantoj de Oomoto (pluraj en Esperanto, kelkaj angle kaj kelkaj japane pere de lerta Esperanta interpretado fare de s-ro Okuŭaki, kiu ankaŭ diversmaniere helpis al ni dum nia restado en Oomoto). Ni estis ege ĝojaj, ke oni permesis al ni libere intervjui homojn, sen antaŭsciigi la demandojn, tiel ke la intervjuoj

ĉiam estis spontanaj kaj liberaj. Ni volis ĝuste kompreni la personajn vidpunktojn kaj komprenojn de Oomoto-laborantoj pri la temo de la universitata esploro de mia edzo: kiel oomotanoj harmoniigas ĝiajn naciecajn kaj internaciecajn aspektojn.

Por ni, okcidentanoj, tio ne estas memevidenta, kaj por kelkaj eble eĉ aspektas iomete kontraŭdira : ja de unu flanko ĝi estas tre japancentra, kaj de alia – tre malfermite internacieca (pri tio atestas la interreligia agado kaj la uzado kaj subteno de Esperanto). Estis interese ekscii, ke por la plejparto de intervjuitoj tiuj

du aspektoj neniel estas en tensio: jen bona ekzemplo de diferencoj inter okcidenta (tiel nomata kartezia) pensado kaj inkluziveca pensado de japanoj. « En la japana socio oni kreskas laŭ ŝintoismo, geedziĝas kristane kaj mortas budhiste », oni diris al ni plurfoje dum nia dumonata restado en Japanio pri la japana emo alpreni, elekti kaj alproprigi certajn trajtojn de diversaj tradicioj. Kaj vere, la japanoj estas majstroj pri asimiligo kaj plibonigo : ne nur rilate al objektoj, sed ankaŭ al religioj. Kaj simile, tiuj du aspektoj de Oomoto por preskaŭ ĉiuj el niaj intervjuitoj aspektis tute naturaj kaj neniel kontraŭdiraj.

Oomoto ne aktive varbas eksterlandanojn;

ĝi sufiĉe milde varbas enlande (per fojaj reklamoj en televido kaj radio, okazigo de ekspozicioj, ktp.) kaj ĉefe koncentriĝas sur la familianoj de jamaj oomotanoj por certigi, ke ili restas aktivaj en Oomoto. La kialo por ne varbi aktive eksterlandanojn estas simpla : ĉar ĉiuj bonaj religioj devenas de la sama fonto (laŭ la doktrino de « Bankjodokon »), pro tio

estas pli bone, se oni praktikas sian originan religion. (Tio tamen ne povas ne starigi la demandon, kia tiu religio estu, ekzemple, por mi : ĉu kristanismo, kiu estis importita al mia origina mondoparto [Orienta Eŭropo] en la 10-a jarcento, estas

mia « origina » religio? Ĉu paganismo, kiun anstataŭis kristanismo ?..) Tiu nealtrudiĝemo, laŭ mi, estas tre laŭdinda kaj respektinda sinteno, aparte plaĉa al mi persone kaj tute malsama ol la dogmeco de pli ol unu ĉefa monda religio, laŭ kiu tiu religio estas la sola ĝusta vojo, kaj la sola maniero atingi Dion. Fakte, kelkaj okcidentanoj fariĝis oomotanoj ĝuste pro tiu nealtruda sinteno : ekzemple, dum nia restado paro de artistoj el Usono – gesinjoroj Uribe, pasiaj pri ĉiuj japanaj artoj kaj kulturo kaj amikoj de Oomoto dum preskaŭ 40 jaroj – finfine oficiale fariĝis oomotanoj.

La trian semajnon ni partoprenis en



Kun oomotanaj kursanoj de Esperanto en Ajabe



Ili vizitis eĉ Izumo-Taiŝa en Izumo

la anglalinvga kurso pri Oomoto por alilandanoj. En nia grupo estis kelkaj kristanaj studentoj el Okcidenta Eŭropo (ĉefe, Germanio), kiuj studas japanajn religiojn en Kioto dum kelkaj monatoj, kaj malnova amikino de Oomoto – esperantistino el Pollando, nun loĝanta en Anglio – Maŭgoŝa.

Ĉiumatene dum tiu semajno ni vere vivis kaj spiris kiel oomotanoj – ni vekigis je la 5:30 kaj, kune kun oomotanoj ; tremante pro malvarmo, ni purigis la templon, partoprenis en matena kaj vespera diservo kaj tage partoprenis la kurson, elstare gvidatan de s-ro Kimura kaj aliaj Oomoto-laborantoj. Ni havis la ŝancon konatiĝi ankaŭ kun aliaj oomotanoj kaj lerni pri uta-festivalo (kaj eĉ mem ĉanti utaojn), ĉinkon-meditado, historio de Oomoto kaj Universala Homama Asocio –

UHA (kaj ni eĉ inspiriĝis membriĝi en UHA kaj fondi la kanadan sekcion de ĝi!).

La zenito de tiu ĉi kurso estis partopreno en granda Aŭtuna Festo de Oomoto en Ajabe, kun miloj da aliaj partoprenantoj, kaj eĉ la spertado de la aŭtomata skribado fare de la membroj de Tao-Juan : nova religio el Ĉinio (Tajvano) – unua religio, kun kiu Oomoto ekhavis fratecajn rilatojn antaŭ ĝuste naŭdek jaroj. Estis tiom da partoprenantoj en la festo, ke ĉiuj multaj ĉambroj en la sanktejo de Ajabe estis homplenaj, kaj homoj en la ne-ĉefa ĉambro povis nur per televido spekti la riton, kiu okazis en la ĉefa halo.

Dum nia restado ni ankaŭ kun granda ĝojo instruis Esperanton, plejparte, prezentante niajn devenlandojn (Ukrainion kaj Usonon) kaj loĝlandon (Kanadon), kaj kantante Esperante, ukraine, france kaj angle. Mi ankaŭ malkovris, ke la japanoj tre ŝatas kanti kaj tre lertas pri kantado. Fakte, ĝuste en Japanio mi remalkovris tiun ĉi malnovan pasion, kiun mi ne praktikis dum tro longa tempo, partoprenis la ekzercojn de la Oomoto-koruso « Ĉielo » kaj eĉ prezentis kun



Kun oomotanaĵ kursanoj de Esperanto en gaja urbo, Oosaka

la korusanoj du kantojn en maljunulejo de Kameoka : Esperantlingve la alian version de « La Espero » (kiun mi mem pli ŝatas ol la oficialan Esperanto-himnon), kaj japanlingve la belan japanan tradician kanton Furusato, kies vortojn mi bone parkerigis dum la ekzercoj.

Kompreneble, restante en Oomoto ni ne nur studis kaj instruis – ni ankaŭ turismis kaj ĝuis kaf-/te-umadon kaj babiladon kun laborantoj de Oomoto (kiel mi malkovris, estas ne nur agrable, sed ankaŭ tre utile, ĉar tie ni renkontas plurajn tre interesajn personojn kaj ankaŭ neformale lernas pri la funkciado de Oomoto).

Al nia adiaŭa festo venis pluraj laborantoj de Oomoto, korusanoj kaj la Esperanto-kursanoj, tiel ke la ĉambro estis tute plena. La bondeziroj de la partoprenintoj estis ege kortuŝaj kaj estis malfacile reteni larmojn... Forirante de Kameoka, en la trajno, mi pensis pri la ĉeno de eventoj, kiuj konatigis min kun Oomoto.

D i v e r s a j
hazardaj aferoj

ligiĝas unu al la alia, kaj, dum tiuj eventoj okazas, ne ĉiam eblas kompreni la kialojn kaj la sekvojn. Estas iom kiel rigardi la pentraĵon de tro proksime : vi vidas detalojn, sed ne la grandan bildon. Mia konatiĝo

kun Oomoto estis tia. Mi hazarde lernis Esperanton, hazarde konatiĝis kun mia edzo per Esperanto. Kaj pasintjare s-ro Okuŭaki de la internacia fako de Oomoto hazarde eksciis pri nia restado en Kioto kaj invitis nin al Oomoto. Dum ni studis en la arkivoj kaj faris la intervjuojn, mi komprenis, ke ĉiuj ĉi eventoj ne estis hazardaj. Eble ne destino, sed ankaŭ ne hazardo. Mi bezonis veni ĉi tien ne nur por helpi al mia edzo pri lia esplorado, sed ankaŭ por mia persona evoluo. Mi trovis Oomoton kaj ĝian historion fascina, kaj oomotanojn sinceraj kaj bonkoraj. Mi trovis la respondojn al multaj el miaj demandoj, sed intertempe naskiĝis pli da demandoj, la respondojn al kiuj mi iam esperas trovi.

Dum mia adiaŭa vorto mi diris, ke ĉiu persono, kiun mi renkontis, iomete ŝanĝis min persone al pli bona homo, kaj tio ne estas



Adiaŭa Vespere

troigo: ja ĉiuj oomotanoj, kiujn ni renkontis, montris al ni tiom da atento kaj zorgemo! Multaj fariĝis niaj bonaj amikoj, kaj pri kelkaj mi eĉ pensas kiel pri miaj familianoj. Mi kredas, ke mi

fariĝis pli bona persono pro tiu ĉi kontakto kun Oomoto-samideanoj, kaj pro tio mi estas eterne dankema!

Dankvortoj de s-ro Joel Amis

“Esplorprojekto havas definitan komencon kaj finon... sed nia rilato kun Oomoto ne finiĝas kun la fino de mia esplorprojekto”. Tiel mi resumis mian senton, kiam mi adiaŭsalutis Oomoto-stabanojn en la lasta tago de nia restado en la Oomoto-Centro en Kameoka. Ĉar, kvankam Oomoto certe estas intereseaga esplorobjekto por fakulo pri religia scienco kiel mi, Oomoto por mi estas multe pli ol simpla akademia intereso. Oomoto – ĝia agado, ĝiaj idealoj kaj ĝiaj homoj – estas speciala – kaj ĉiam okupos specialan lokon en mia koro.

Mi volas esprimi mian plej elkoran dankon al ĉiuj laborantoj en la Oomoto-Centro (kaj ankaŭ al aliaj oomotanoj, kiujn ni renkontis – en Esperanto-kursoj, festoj kaj aliloke) : pro vi ĉiuj, nia restado estis ne nur fruktodona kaj instrua je akademia nivelo, sed ankaŭ inspira, pensiga kaj entute agrablega je persona nivelo.

Specialan dankon mi esprimas al s-ro Taga Norijuki, ĉefdirektoro de Oomoto, kaj s-ro Agou de la Internacia Fako pro ties gastigo de ni, al s-ro Kimura, kiu gvidis nin dum la anglalingva kursaro pri Oomoto, kaj al s-ro Okuŭaki, kiu senlace kaj diversmaniere helpis al ni per interpretado, klarigado, gvidado ktp. – mi estus tute perdita sen lia



En biblioteko de Oomoto

helpo!

Fine mi volas esprimi mian plej elkoran subtenon por la agado de Oomoto sur la kampoj de interreligia agado kaj interamikigo, interpacigo de la homaro (per Esperanta agado, UHA, k.s.) – tiu agado distingas Oomoton de aliaj religioj. Kaj pro tiu grava agado mi fieras konsideri min frato de Oomoto. Bonvolu daŭrigi kaj ampleksigi tiun bonan agadon – la mondo bezonas ĝin!

Kannagara tamaĉi haemase!

DEGUĈI NAO

Biografio de la Fondintino de Oomoto

4

OOIŜI Sakae, *tradukis Mathias DALMOSE*

Malfermo de Meŝima

Tuj kiam ili revenis de Oŝima, Nao daŭrigis la skribadon de Fudesaki, kaj post nelonge ŝi ricevis novan ordonon. Ĉifoje ili devis iri al alia insulo, eĉ pli nealirebla ol Oŝima, neloĝata insulo sur kiun neniu homo paŝis dum memorebla tempo. Estis la insulo Meŝima, kie, laŭ Fudesaki, Uŝitora no Kongin estis kaptata – loko de plej profunda graveco por Oomoto.

La 2an de aŭgusto dum la sama jaro, Nao, Onisaburo kaj Sumiko ekiris el Ajabe denove, kun ses sekvuloj. Ilia misio sur Meŝima estis konstrui sanktejon por Uŝitora no Kongin kaj ĉiuj dioj de la ĉielo kaj la tero, kaj preĝi por mondpaco.

Kiel antaŭe, ili dungis Rokuzoo Haŝimoto kaj Iŭakiĉi Tanaka por remiveturigi ilin tien, kaj la kunularo

enboatiĝis en Majzuru, ĉi-foje sur nekutime trankvila maro.

La golfo estis kiel polurita spegulo, kaj la kunularo admiris la lunlumigitan scenon dum la fiŝkaptistoj trankvile tiradis la remilojn. Kiam ili atingis Kabon Bakuĉi, tre malkutime trankvila sceno sin vastigis ĉirkaŭ ili, la retrospegulado de la lumturo ludadis sur la ondetoj malantaŭ ili, Laktovojo vastiĝis supre sur la ĉielo kun sia retrospeguliĝo sur la maro malsupre, kaj inter tiuj du briletis la kreskanta kuŝanta luno fore ĉe la horizonto, preskaŭ tuŝante sian speguliĝon sur la akvo. La fiŝkaptistoj remadis la tutan nokton, asertante ke ne estis tiel trankvila maro dum multaj jaroj, kaj ke tio certe estas dankinde al la protekto de la dioj de Oŝima kaj Meŝima.

La venontan matenon la du boatoj

sekure atingis la marbordon de Oŝima, kaj la tuta grupo kun Nao recitis la preĝon de Amacu-Norito antaŭ la sanktejo sur la insulo. Keitaroo Kinoŝita kaj tri aliaj, Jasunosuke Fukubajaŝi, Juusuke Ŝikata kaj Takezoo Nakamura, restis sur Oŝima por purigi la sanktejan placon, dum Nao, Sumiko, Onisaburo, Heizoo Ŝikata kaj Toranosuke Fukuŝima, la edzo de Hisako, ekiris al Meŝima.

Meŝima, laŭ sia reputacio kiel tabuizita insulo, estis tre malsimila de Oŝima. Kvankam la boatistoj asertis ke la maro estas escepte trankvila tiun tagon, grandegaj marmoviĝoj de la vasta maro senpente bategis la boaton. Mevoj, albatrosoj, kormoranoj, kiel multegaj nigraj punktoj sur la rokoj, rigardis malsupren al la vizitantoj ŝajne mirantaj, kaj krom tiuj, miloj da marbirdoj, jen ŝvebante, jen plonĝonte flugis super la ondoj.

Ĉar ili ne povis trovi alireblan lokon inter la krutaj rokoj, ili remis ĉirkaŭ la insulo cerbumante kion fari, kaj subite Nao diris, "Iru al tiu roko!" La roko indikita de Nao, estis preskaŭ vertikala, ofertante neniun eblecon alkroĉiĝi al ĝi. Dume estis konstanta danĝero de ondegaj kiuj povus puŝi la boaton kontraŭ la rokon dum ili hezitis.

Onisaburo fiksnodis al si longan ŝnuregon kaj saltis de la boato tuj kiam

la ondoj portis ĝin proksimen al la roko. Bonŝance, Onisaburo sukcesis alkroĉiĝi al la kruda roko kaj rampi supren ĉirkaŭ kvin jardojn ĝis iom malpli kruta loko. De tie li ĵetis la ŝnuregon en la boaton, kaj kiam la fiŝkaptistoj estis nodfiksintaj la ŝnuregon al la boato, Nao sin alkroĉis al la ŝnurego dum Onisaburo levis ŝin. Tiel same post Nao la aliaj sukcesis elboatiĝi. Tanaka kaj Haŝimoto restis en la boato kaj komencis elŝarĝi la sanktaĵon, kiun Nao kunportis de Ajabe, dum Heizoo Ŝikata kaj Toranosuke Fukuŝima tiris ĝin supren de supre per la ŝnurego, kolonon post kolono. Finfine atinginte ebenan rokan lokon de ĉirkaŭ ses kvadratmetroj, kelkcent futoj supre, ili decidis ke tiu estu la loko por la sanktejo. Onisaburo recitis la ensanktejigan preĝon, kaj post oferado de aĵoj de la montoj, kampoj, riveroj kaj maroj al Uŝitora no Kongin, la princino de la draka palaco kaj ĉiuj dioj de la ĉielo kaj la tero, Nao recitis la preĝon de Norito por mondpaco, kaj fine la tuta kunularo ĉantis la purigan preĝon.

Post la preĝado, la kunularo revenis en la boaton kaj remis fojon ĉirkaŭ la insulon, admirante la belegajn rokojn kaj klifojn, antaŭ ol reveni al Oŝima. Sur Oŝima ili oferadis kaj preĝis antaŭ la sanktejo, nun balaita kaj purigita, kaj post promeno sur Oŝima, ili revenis al Majzuru, kie ili

alvenis sekure la vesperon de la 3a. La 4an ili revenis al Ajabe.

Pilgrimado al Monto Kurama

Dum la aŭtuno de la sama jaro Nao devis denove fari pilgrimadon. Fudesaki montris ke tri homoj ŝin akompanos, sed ne indikis la celon. Unue ili devis iri al Jagi kaj tie atendi pluajn indikojn.

La multaj sekvuloj kiuj aŭdis pri tio, ĉiuj petis al Nao permeson ŝin akompani, sed Nao strikte rifuzis, dirante ke Uŝitora no Kongin ne donis sian aprobon.

Je la unua en la mateno de la 1a de oktobro, Nao ekiris, akompanate de Onisaburo, Sumiko, kaj Haruzoo Ŝikata, vestitaj per pajlaj pluvmanteloj kaj kareksaj ĉapeloj. Haruzoo Ŝikata estis forte kritikema pri la novulo, Onisaburo, kaj kun aliaj el la pli fanatikaj sekvuloj de Nao, kondukis kampanjon por elgrupigi lin. Unue Onisaburo rifuzis iri kun Ŝikata, sed ĉar Nao insistis, li kontraŭeme konsentis partopreni la pilgrimadon. Nao portis bastonon el umearbo, Onisaburo bastonon el virpino, Sumiko bastonon el inpino kaj Ŝikata bastonon el bambuo. Kverelo tuj ekestis inter Onisaburo kaj Ŝikata, kiu insistis ke la virpina bastono prave estu lia. Finfine, tamen li cedis kaj malkontente

postiris la aliajn kun la bambua bastono.

Proksimiĝante al Pasejo Enoki, ili ekvidis Jasunosuke Fukubajaŝi starantan ĉe fajro. Fukubajaŝi estis antaŭenirinta la aliajn, kaj, vestita per vojaĝovesto kaj portanta propran umearban bastonon, atendis la kunularon de Nao. Tuj kiam li ekvidis la kunularon, li ekfaligis sin surgenuen kaj petis permeson akompani Nao en ŝia pilgrimado. Nao obstine respondis, “Neniel vi povas veni kun ni. Estas dia ordono.” Fukubajaŝi, ploranta, deklaris ke li ne iros hejmen, eĉ se pro tio li mortos tie. Onisaburo, impresita de lia persistemo, kompatige parolis kun Nao kaj proponis ke ŝi nur lasu lin porti la pakaĵaron, eĉ se li ne povas kuniri kiel pilgrimulo. Nao fine ekkonsentis, kaj Fukubajaŝi ĝojege levis la sakojn de la aliaj kvar sur siajn ŝultrojn, kaj sekvis malantaŭe de la grupo.

Alveninte al la domo de Toransuke Fukuŝima en Jagi, la kunularo de Nao tie restis dum la nokto. La venontan matenon, Onisaburo preĝis antaŭ la altaro de Fukuŝima, kiam li ekposediĝis kaj verkis jenan poemon:

Yo no naka no
Hito no kokoro no
Kurama jama
Kami no hikari ni
Hiraku kono miĉi

(La koroj de la homoj de ĉi tiu mondo mallumiĝis "kuramu". La vojo estas malfermata per la dia lumo.)

Tiel malkovriĝis ke ilia celloko estu Monto Kurama, norde de Kioto.

La kunularo haltis survoje por preĝi ĉe Sanktejo Kitano en Kioto (sanktejo dediĉita al Sugaŭara no Miĉizane, lertulo (vicĉefministro) de Heian Periodo, admirata patrona sanktulo de lernado). Nao tristiĝis pensante pri la longa periodo dum kiu Uŝitora no Konĝin estis maliberigita en la nordoriento kun neniu por konstrui al li sanktejon nek lin adori, dum estis grandiozaj sanktejoj kiaj tiu ĉi, dediĉitaj al simplaj homoj. La kunularo urĝis al Monto Kurama.

Pinte de la monto situas la malsimetriaĵaj placoj de Kuramadera, budhisma templo. Ene de tiuj placoj estas interna sanktejo en kiu, laŭ la kredo de la uzantoj de la templo, ensanktejiĝis demonia reĝo. Onidire tiu potenca spirito venis al la terglobo de Venuso antaŭ 6.500.000 jaroj, por gvidi la sorton de la homaro kiel la spirita reganto de la terglobo. Tiuj kiuj kunlaboras kun la spirito, ricevas dian protekton, sed tiuj kiuj ĝin kontraŭstaras estas detruotaj.

Alveninte al la interna sanktejo, Nao

recitis la preĝon de Amacu Norito, post kio ili etendis sur la grundon siajn pajlajn pluvmantelojn kaj komencis tutnoktan preĝadon antaŭ la sanktejo. Ĉirkaŭ tagiĝo kelkaj blankvestitaj asketoj venis al la sanktejo. Unu el tiuj subite komencis krei al Onisaburo, "mallevu vian kapon! Mi estas la granda demonia reĝo el Kurama!"

Komprenante ke la viro estas posedata de malalta spirito, Onisaburo tuj respondis "silentu vi, maljuna melo!" kaj eligis la spiriton. Vidante la viron fali surdorsen, la aliaj asketoj sin turnis al Onisaburo kaj kolere kriis, "Hontu je via malrespekto pri la granda demonia reĝo de la monto!"

Tiam alia el la asketoj, nomita Sumimoto el Osaka, ekposediĝis kaj antaŭenpaŝis dirante, "Mi estas la vera demonia reĝo. Ne dubu tion." Sin turninte al Onisaburo, li daŭrigis, "Vi kaj la maljunulino estas iloj de vera Dio. Dankon pro via alveno ĉi tien. Ekde nun mi restos en la monteto Honguujama en Ajabe."

Poste, sin turninte al Ŝikata, li diris, "Haruzoo, vi estas la ilo de malbonaj spiritoj. Ŝanĝu vian koron!"

Post unu plia nokto sur la monto, Nao kaj ŝia kunularo komencis la vojaĝon hejmen al Ajabe. Ŝikata konfesis al Fukubajaŝi ke li havis teruran sperton dum la nokto, sed ne deziris rakonti detale. Tiu antaŭa gvidanto de la grupeto

kontraŭ Onisaburo, tute menspremiĝis post sia sperto sur Monto Kurama kaj baldaŭ forlasis Oomoton, irante al sia hejmo en Uedani. Monaton poste, la 13an de novembro 1900, li mortis je la juna aĝo de dekok jaroj.

Ventegozan nokton, kiam ili estis alvenintaj al Ajabe nur kelkajn tagojn, Nao sin turnis al Onisaburo post subita forta ekblovo de la vento kaj diris, “La demona reĝo ĵus venis resti en Honguujama, kaj lia familio ekloĝis en la granda cedrarbo.”

Misio ĉe Moto-Ise

La 19an de aprilo, 1901, Nao skribis la sekvantan en Fudesaki: “Estas neniu akvo en la mondo por komparo kun la pura kristala akvo de la pordo de Ĉiela Rokokaverno ĉe Moto-Ise. Iru tien kaj portu el tie iom da tiu akvo.”

Ĉiela Rokokaverno estas la scenejo de la antikva ŝintomito pri la suna dio Amaterasu, kiu, ĉagrenita pro la maldeca konduto de ŝia pli juna frato, la dio Susanoo no Mikoto, sin kaŝis en la roka kaverno tiel ke la mondo estis kovrata en mallumo. Tiu kaverno onidire situas ĉe Moto-Ise, norde de Ajabe, kie la suna diino origine estis ensanktejigata antaŭ kiam la nuna granda sanktejo de Ise estis starigata sur la bordo de Pacifika

Oceano. Fudesaki daŭrigas: “Se tio ĉi ne estus ordono de Uŝitora no Kongin, vi ne kapablus akiri tiun karegan akvon. Uŝitora no Kongin donis sian permeson tiel ke vi ne obstakliĝos.”

Keitaroo Kinoŝita iris al Moto-Ise por ekscii pri la planoj. Reveninte li rakontis ke preno de tiu akvo estas malpermesita ekde antaŭmemora tempo, kaj ke onidire, se iu malobeus tiun malpermeson, ekestus detruantaj ventegoj kaj grandegaj inundoj. Estis pastro gardanta ke neniu tuŝu la sanktan akvon, kaj por atingi la lokon de kie eblas preni la akvon, necesus transiri rapidfluantan riveron proksimume dekdufute larĝan.

Ses tagojn pli poste, la 26an de aprilo, 1901, kiam Nao estis 64-jara, ŝi ekiris de Ajabe kun Onisaburo, Sumiko, kaj trideknaŭ sekvuloj, el kiuj plejparto estis sensciaj pri kio temas la misio. Ili kunportis du segmentojn da verda bambuo por porto de la akvo.

Alveninte al Moto-Ise, ili haltis por resti ĉe teejo. Kaŝe de la aliaj sekvuloj, unu el la kunularo, viro nomita Joŝimacu Moricu, ŝtele foriris al la sanktejo dum Kinoŝita ĉe la enirejo de la teejo atendis sciigon pri ebleco ekiri. Ĉio tio estis aranĝata por ke la pli maltrankviligeblaj el la kunularo ne eksciui kio okazas.

Dum la suno estis malleviĝanta, Moricu

revenis kaj sciigis ke la pastro gardanta iris al sia domo, verŝajne por vespermanĝi. Kinoŝita, komprenanta ke estas nun aŭ neniam, ekkuris kiel eble plej rapide. Alveninte al la roka kaverno, li videtis, en la lumeto de la malleviĝanta suno, maljunan arbotrunkon kiu estis metita transriveren, pasejo kiu ne estis tie ses tagojn antaŭe. Uzante la trunkon kiel ponton, li transiris la riveron, plenigis la bambuartikojn per la sankta akvo, kaj revenis al la teejo.

Nao tre ĝojiĝis, kaj kiam Kinoŝita rakontis al ŝi pri la arba trunko, ŝi diris, "Tio ne estis ordinara arbotrunko. Tio certe estis la draka dio mem kiu venis nin helpi."

La sekvintan tagon ili preĝis ĉe la sanktejo kaj adiaŭis al Moto-Ise, kaj piediris la tutan nokton reen al Ajabe. Nur kiam ili revenis al Ajabe, Nao publike anoncis la faktojn pri la misio kiun ili sukcese plenumis.

La sanktan akvon, kiun ili kunportis, ili unue oferis sur la altaro de Uŝitora no Kongin. Unu cilindro estis konservata, kaj el la alia la sekvuloj unu post alia ĉiu trinketis, antaŭ verŝi la restaĵon en la puton de Oomoto, kie ĝi iĝis Kimmeisui (ora brila akvo), kaj en la putojn de la antaŭaj hejmoj de Deguĉi kaj Ŝikata. (Tiu tempe tiuj putoj ambaŭ apartenis al

eksteruloj, sed ili poste reposediĝis de Oomoto.)

La konservitan cilindron da akvo ili miksis per la akvo de Kimmeisui, kaj en majo, Nao, akompanate de tridek kvin sekvuloj, portis tiun akvon al la insulo Meŝima, grimpis ĝis la supro de la roko kie ili surteriĝis pasintjare, kaj verŝis la akvon en la maron, preĝante:

"Ho, Uŝitora no Kongin, ni humile petas, ke vi, per via forto vasta kiel Pacifika Oceano kaj profunda kiel Japana Maro, fluigu tiun ĉi puran akvon de Moto-Ise en la marojn de la mondo, transformiĝu en nubojn, pluvon, neĝon kaj hajlon, akvumu al la kvin kontinentoj, purigu koruptajn spiritojn, forlavu malpuraĵojn, kaj konstruu paradizon surtere."

Pri tiu rita transigo de fluidaĵo, Nao diris, "Post tri jaroj la akvo ĉirkaŭiros la tutan mondon, kaj tiam la mondo komencos moviĝi. Intertempe, homoj kies sorto estas servi je la dia plano komencos ariĝi ĉi tie."

kvina parto

KIO ESTAS VERA "MI" ?

2

DEGUĈI Hidemaru, tradukis ITOO Eizo

Laŭ la gvido de gardospirito

La suĉinfano estas vartata de la patrino en ĉiu afero. Kiam ĝi iom kreskas, ĝi povas mem plenumi kelkaj aferojn, ekz. rilate manĝon, trinkon, ellason k.s. sed la plejparto de ĝia vivo estas sub la protektado de gepatroj kaj familianoj. Precipe rilate la vivon de la spirita flanko ĝi kreskas ekskluzive dank' al la enverŝiĝo el ekstere.

Kiam ĝi kreskas al knabo kaj poste al junulo, ĝi iom poste akiras la povon mem decidi kaj fine kiam ĝi atingas la maturecon, ĝi povas mem stari almenaŭ laŭmateria vidpunkto. Kaj tamen laŭ la spirita vidpunkto li ankoraŭ vagas tien kaj reen en maltrankvileco kaj senpacienco, ĉar li ne jam proprigis al si klaran vivkoncepton.

Kiel la korpaj gepatroj prizorgas lian materian vivon, lian primaran animon prizorgas la gardospirito. Kiel la gepatroj spertas ne priskribeblajn malfacilaĵojn ĝis kompleta kreskiĝo de unu infano, tiel same la gardospirito dediĉas ekstreme grandegan

prizorgon por maturigi unu animon.

Homo devas klopodi por kiel eble plej frue atingi la sendependecon en la socio, kiel individuo, tiel same li devas ankaŭ akiri la memstarecon spiritan.

En ĉi tiu fizika mondo troviĝas tre malmultaj animoj sendependaj. Preskaŭ ĉiuj estas sub la protektadoj el la spirita mondo.

Kiel homo lernas aferojn dank' al instruistoj, tiel same homo spirite maturiĝas dank' al diversaj protektadoj el la spirita mondo.

Distingitaj eminentuloj en la antikva tempo konsciis tiun protektadon kaj ĉiam sin disciplinadis laŭ instrukcioj spiritaj.

Kvankam aspektas, laŭ supraĵa rigardo, ke homo marŝas vojon per si mem, en efektiveco li povas iri nur dank' al la akompano de nevidebla gvidanto nome gardospirito. Sen protekto de gardospiritoj homo eĉ ne povas teni la vivon de la korpo.

La korpo estas loĝejo de spirito. La korpaj

aktivecoj tamen ne estas la tuto de la spirita aktiveco sed nur ĝia parto. La primara gardospirito, la gardospirito kaj la vicgardospiritoj ĉiam alterne eniradas en la korpon kaj vigle faras videblan aktivecon.

Ĉiukaze dum homo vivas nepre restas en li iu el la gardospiritoj ĉiam senescepte eĉ unu momenton. Kiam ĉiuj gardospiritoj forestiĝas, tiam la homo mortas.

La spirita aktiveco estas tre vigla, senĉese ripetante disiĝon kaj kunharmoniiĝon. Se iu homo A pensas pri alia B, parto de la spirito apartenanta al A flugas aperas (spirite) al B, portante saman formon de A (spirite). Tiam B ekkonscias tion spirite kaj sekve aperas al lia konscio ia penso pri A.

La Diposedo estas la stato, en kiu iu Dispirito kunharmoniiĝas kun la animo de homo provizore. La forteco de Diposedo kaj la grado senerareco (orakolo) dependas de perfekteco de la kunharmoniiĝo. (Kompreneble esence tio dependas de la klaso de tiu Dispirito.)

Nur kunharmoniiĝante kun altklasa Dispirito la homa animo povas sin supren levi; harmoniiĝante kun malaltklasa spirito, ĝi nature degeneras. Simple dirite, homo fariĝas Dio se li pensas pri Dio; Li fariĝas demono se demonon li pensas.

Homo devas konstante pensi la purecon kaj ĉiam esti pli bela, pli bona kaj pli vera kaj nur tiamaniere lia animo povas leviĝi senlime pli alten.

La ekstera mondo aperas al homo responde al la spirito kiu loĝas en li. Kiam loĝas spirito A aperas al li ekstera mondo, responde al A; kiam loĝas spirito B aperas nur la ekstera mondo, kiu respondas al B.

Ju pli altklasa estas la spirito, des pli spiriteca ĝi estas. Do enloĝante en homo ĝi enprenas nur partojn spiritecajn per oreloj kaj okuloj, dume spirito korpeca nur ensuĉas elementojn korpecajn. Do, kia la gardanta spirito, tia montriĝas la ekstera mondo al homo.

Ĉar la fizika mondo estas mondo de modeloj, ofte plej bagatela ago en la fizika mondo havas tre gravan signifon spirite.

Do, por la homoj en la fizika mondo estas rekomendinde, ke ili efektivigu unu post la alia la ideojn, kiuj spontane aperas en ili.

Sed se homo, obsedita de malbona spirito, efektivigas senjuĝe la ideojn, montriĝas kondutoj tre malbonaj. Ĉi tie estas la nepra neceso introspekti.

Aliflanke tamen troa hezitemo pro racio eĉ je ordinara, ne tre malbona afero, ofte malhelpas la internofluon el la Dia regiono. Estas plej dezirinde, ke homo efektivigu sian volon maksimume.

Ekzemple pripensu kiel diferencas la internofluo de Dispiritoj aŭ de anĝeloj dis de la enfluo de malbonaj spiritoj. Kiam okazas

internofluo de Dispirito aŭ anĝelo, homo iel sentas sin vigle pozitiva, serena kaj akceptas senĝene kaj agrable ĉion de la cirkonstancoj, plenumante la laborojn unu post la alia en ordo. Kiam okazas enfluo de malbona spirito, ĉio estas kontraŭa al la ĵus menciitaj.

Homo estas iel maltrankvila, tendenca, malagrabra kaj emas ekskludi aŭ difekti homojn, ne havante varman, mildajn sentojn por ĉio. Memkompreneble ankaŭ liaj laboroj ofte renkontas barojn.

Nu, iuj povas demandi, ĉu homoj ricevas nur enfluan de malbonaj spiritoj, ĉar niaj temperamentoj tre ofte apartenas al la laste menciita kazo. Ne, neniel. Ĉar ĉiu homo esence estas infano de Dio aŭ loĝejo de Dio, li nepre spertas serenon, mildan temperanton anstataŭ la abomeninda.

Sed pro intensa forgesemo, homo facile forgesas ĉion, krom la nuna temperanton kaj emas pensi ke ĝi daŭros por ĉiam.

Sed en efektiveco sama temperamento neniel daŭras tiel longe.

Eĉ plej dolora, malŝatinda temperamento povas komplete nuliĝi post iom da tempopaso, se homo toleras, sin kuraĝigante kun la konscio, ke li nun batalas kontraŭ malbona spirito pro iu kialo.

Kio estas la plej bona rimedo komunikiĝi kun gardospirito? Tio estas ekzercado de "ĉinkon", t.e. preĝado al la gardospirito per koncentrita koro.

Ĉiu respektive faru tion, kion li volas. Post ĉio homo povas fari nur tiom, kiom kapablas lia gardospirito.

Mirinda forto de penso

Spiriton havas ne nur ni, homoj, sed ankaŭ bestoj kaj plantoj, kvankam diferencas la grado de konscio. Ekzemple arbo etendas la branĉojn al la direkto kie abundas sunradioj kaj la radikojn al la direkto kie troviĝas akvo. Oni diras, ke la kristalo naskas idojn. Tio estas vero. Ĉirkaŭ rokokristalo nature kreiĝas multaj kristaloj. Fenomeno tre simila ĉe animalo. Estas ŝtonoj vivantaj kaj mortintaj. La unuaj aspektas rimarkeble tre vivaj, dum la alia sin montras iel mortaj. La unuaj entenas spiriton kaj la aliaj jam ne havas. Tion ni ofte rimarkas kaj precipe tre klare la specialistoj—ŝtonistoj.

Do ni povas aserti, ke la spiritaĵon havas ne nur animaloj, sed ankaŭ vegetaloj kaj eĉ mineraloj nur kun diferenco de la denseco. Inter la spiritaĵo kiu ĝenerale plenigas la universon kaj la spirito individueca troviĝas diferenco de aktiveco, kvankam ne diferencas esence. La unua estas maldensa, senkonscia kaj ĝenerala, kvankam ĝi montras delikate mistikan forton; la dua estas koaguliĝo aŭ ĝemo, unuecigita organizo havanta klaran memkonscion.

Estas notinde ke la spiritaĵo povas enpreni

en iun ajn objekton, simile al iaspecaj radioj.

Ekzemple kiam glavforĝisto faras glavon kun koncentrita energio el sia tuta personeco plene purigita, tiam lia penso aŭ spiritaĵo enpenetras en la glavon kaj elfariĝas majstra verko.

Inter du verkoj de unu sama forĝisto aperas rimarkinda diferenco, se unu estas forĝita speciale kun tuta entuziasmo purigita kaj la alia ne. Ne la teknika lerteco faras bonan verkon, sed la sincera entuziasmo dediĉita kreas mirindan pecon. La spiritaĵo enpenetranta estas iel sentebla ankaŭ al ordinaraj homoj.

Io simila okazas kun diversaj objektoj. Ekzemple iu posedas horloĝon kaj ĝin varme amas, ĉiam laŭdante ĝian utilecon kaj precizecon. Tiam lia pozitiva penso enpenetras en la horloĝon kaj donas bonan influon al ĝi, kvankam laŭ ekstera aspekto rimarkeblas nenio speciala. Kiel la aero eniras en tre malgrandan fendeton, tiel— aŭ multe pli ol la aero, la spiritaĵo povas enpenetri iun ajn objekton. Kvankam glaso aŭ ŝtono ne estas enirebla por aero, nenio estas nepenetrebla por spiritaĵo. Ŝtono, glavo, glaso, fero—ĉio estas enpenetrebla por ĝi.

La homa penso penetriĝas en iun ajn objekton. Ekzemple se oni amas unu arbon aŭ herbon kaj ĉiutage ĝin vizitas kun intense bondeziro, ĝi pli bone kreskas, ol aliaj arboj aŭ herboj, kiujn li ne vizitas. Se farmisto ĉiumatene promenas ĉirkaŭ sia rizkampo,

nur pro tio la rizo bone kreskas, kvazaŭ ricevinte bonan sterkon. Ekzemple metu du manplantojn. Al unu ĉiam sendu bondeziron kaj al alia malbenon. La unua bone kreskas dank' al la bona spiritaĵo, dum la alia mortiĝas pro malbona spiritaĵo. Tre mirinda estas la homa penso.

Terura estas la homa penso. Malamikaj pensoj, se ne likviditaj, restas postmorte, kaj daŭrigas la batalon. En historia loko, kie iam antikve okazis kruela batalo, ankoraŭ nun ŝvebas malbonaj spiritoj kaj okazigas batalojn obsedinte homojn aŭ bestojn, eĉ insektojn.

En similaj historiaj lokoj homoj emas dividiĝi en du aŭ tri grupojn kaj konstante bataladi inter si, ĉar ili ricevas influon de la batalemaj spiritoj.

Se homo ekhavas ian inferan penson okaze de efektivigo de iu afero, ofte terura demono lin obsedas utiligante la ŝancon, eĉ se la afero havus tre bonan celon.

Frunto, ventro kaj epigastra kavo

La loko, kie inter partoj de la kapo homo plej klare sentas spiritaĵon, estas frunto kaj tio inter partoj de la korpa trunko estas ventro. Homo sentas ekŝveliĝon de la ventro, kiam li staras ĉe ekstrema malfacilaĵo aŭ faras fervoran preĝon. Tiam li pleniĝas per ia forto aŭ kuraĝo.

Se iu deziras sperti tiun staton, li elingigu glavon fame konatan, kiel majstra verko, kaj ĝin rigardu. Tiam li certe spertas la ŝveligon de la ventro. Tio okazas ĉar la majstra verko entenas bonan spiritaĵon kaj ĝi influas la rigardanton.

Jam de antikva tempo oni diradis, ke majstre verkita glavo serenigas homan temperamenton. La kaŭzo estas ne ĝia bela formo nek ĝia poluriteco, sed la spiritaĵo, kiu plenigas la glavon. Oni povas senti ĝin eĉ kun fermitaj okuloj.

Ne nur la ventro, sed ankaŭ la frunto bone ĝin sentas.

Troviĝas budisma protekto kun unu alia okulo ĉe la mezo de frunto, krom du aliaj ordinaraj. Ĝi sugestas la punkton kie eniras spiritaĵo.

Kiam homo entuziasme pripensas ion, li senkoncie koncentras la spiriton ĉe tiu ĉi punkto. Aliflanke en la okazo, kiam homo sentas enuon je sia laboro aŭ disflugon de la penso, li povas sin reordigi, konscie koncentrate la spiriton ĉe la sama punkto. Por tio helpas la meditado kun okuloj duone fermitaj.

Ĉiu povas senti la spiriton per la frunto, se ne klare vidi ian figuron. Eĉ po kvinminuta meditado ĉiutage certe oni ricevos rimarkeblan sperton tiurilate, nur se oni meditas kun ia preĝo ricevi lumon el supre.

Sed se homo faras koncentradon de spirito, tenante egoisman malican volon en sia

profundeco, povas okazi terura rezultato, ĉar kolektiĝas malbonaj spiritoj, kiuj logas lin al pli intensa malbono.

Sur la homa korpo estas tri kampoj: la supra kampo estas la frunto, la meza estas la epigastra kavoj kaj la malsupra estas la ventro. Ĝenerale la meza kampo estas la loko, kie facile kolektiĝas malbonaj spiritaĵoj. Kiam homo koleras, malĝojas aŭ timtremas, tiam nepre okazas perturbo al la simpatnervaro ĉe la epigastra kavoj. Ankaŭ kiam homo intense rankoras aŭ bedaŭras, embarasiĝas la senvola muskolaro ĉe la sama loko. Tion oni povas mem rekoni atente observante siajn spertojn aŭ eĉ pruvi per eksperimento medicina.

La malsupra kampo estas la loko sub la umbiliko—la ventro kun la centra punkto situanta proksimume tri centimetrojn sub la umbiliko. Ĉi tio estas la plej grava centro de homo. Kiam homo dediĉas tutan forton al io, aŭ li tre entuziasmiĝas aŭ kiam li povas plenumi taskon en tre bona ordo, tiam nepre fortikiĝas aŭ ŝvelas la malsupra ventro. En ĉi tiu parto troviĝas multe da periferioj de la simpatiaj nervoj, kiuj enloĝigas relative bonajn spiritaĵojn.

La spiritaĵo en la malsupra kampo, alinome la favora kampo, estas la plej forta kondukanto de la homo. Ni do devas ĉiam ĝin poluri kaj hardi, sed nepre kun humila kredo pri la ebleco komunikiĝi kun la plej supera ekzisto, anstataŭ kun simpla memfido. Tiamaniere sin ekzercante, homo

ricevadas pli kaj pli abundan spiritaĵon de nobla speco kaj ia grava okazo por la popolo li iel ekhavas sinoferemon superhome noblan kaj intuicie faras gravan decidon dank' al helpo de iu bona spirito.

Post ĉio la plej grava afero por la homo estas ĉiam atente zorgi kaj kulturi la nomitajn tri kampojn por akiri bonan rikolton en progresado de la vivo.

Dio estas pozitiva en ĉio. Se homo kaptita de negativa ideo, nur hezitas senfare, tio montras, ke li estas sub regado de vicgardospiritoj.

Sur la homa korpo, la malsupra "kampo" respondas al la spirita mondo, dum la kapo al la fizika mondo. Tial por teni bonan komunikecon kun la primara gardospirito homo devas ĉiam agi rekte laŭ la sugesto de la ventro, anstataŭ simple obei la cerbon.

La LIBRO kun DVD "Rakontoj el Oomoto" estis publikigita!

Okaze de la 98-UK en Rejkjaviko de Islando, la libro kun DVD "Rakontoj el Oomoto" estis publikigita. La libro estis verkita de la tre konata pola e-isto, s-ro Roman Dobrzyński. Li prezentis al la esp-istoj en la mondo la filmon pri la agadoj de Oomoto kun la titolo "Japana Printempo - Oomoto 2009", kiu gajnis la 1-an premion en la Belartaj Konkursoj de UEA por la jaro 2011. Al la libro estas aldonita la novversia filmo. Oni povas aĉeti la libron kun DVD por 20.10€ (2,500 enoj) ĉe UEA, SAT, JEI kaj Tensei-ŝa (vendejo de Oomoto).

— *Kial vi elektis Oomoton kiel la temon?*

En 2009 dum kelkaj monatoj mi gastis ĉe Oomoto, invitate por studi kaj eventuale verki libron pri tiu movado-religio tiel forte ligita kun Esperanto. Ravis min la japana printempa sezono, ĝiaj bunteco, ekzotiko, facinaj festoj kaj ankaŭ ĉiutagaj eventoj interne de Oomoto. Ĉio ĉi estis filminda.

— *Kaj vi faris dokumentan filmon pri Oomoto.*

Ne estis mia intenco fari pri Oomoto prelegon ilustritan per bildoj, sed prezenti personajn impresojn pri mia estado en Japanio.



Roman Dobrzyński

— *Kiel vi tie interkompreniĝis?*

Ekskluzive en Esperanto. Tuj post la alveno al la Oomoto-Centro en Kameoka mi vizitis banejon kaj sidiĝis en ampleksa kuvo kun varma akvo, el kiu elstaris kelkaj nigraharaj kapoj.

Imagu mian miron, kiam tiuj kapoj alparolis min en Esperanto. Tio konsciigis al mi, ke Oomoto estas tutmonde rara neesperantista institucio, en kiu eblas konstante uzi Esperanton.

(El "Tempo por kino" sur januara numero de "Esperanto" en 2012, la oficiala organo de UEA)

DVD estas farita per NTSC-sistemo. Ĝi funkcias en Usono kaj Japanio. Sed oni povos vidi la DVD-n per komputilo. Se vi havas demandon, bonvole turnu vin al Esperanto-Populariga Asocio.

Tenon-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, 621-8686

Tel: 0771-56-9074 ; Telefakso: 0771-25-0061

Retadreso: oficejo@epa.jp

